

Esperanto
V-19034/1995

EL POPOLA 中國報道

CINIO




6

1995

ISSN 0032-4361

- HARDI SIN EN MALFACILOJ
- MARA EKONOMIO DISVOLVIGANTA
- IMPRESO PRI JIAXING
- CHEN SHIDE — MENTORO ETERNA



Kolora ŝtono kun vejnoj

Foto de HAN HONG

INTER NI

Kion proponas niaj legantoj?

Post kiam ni starigis la *Fondaĵon EPĈ-abono* en 1993, ni ricevis monhelpon de pli ol 50 legantoj kaj per tiu monsumo abonigis pli ol 700 esperantistojn, kiuj ne povas pagi, sed tre deziras nian revuon. Multaj el ili skribis al ni por esprimi sian koran dankon pro la donacita revuo, kaj kelkaj skribis, ke ili volonte pagos, post kiam ili venkos la financon

malfacilon. Nun ni daŭre klopodas por monkolektado kun la espero, ke pli multaj niaj legantoj partoprenos en tiu signifoplena agado.

S-ro Josef Kristian el Slovakio skribis en sia letero: "Kvankam vi enlistigis la donacojn al *Fondaĵo EPĈ-abono*, sed mankas ilia preciza adreso. Se vi skribus la tutan adreson, mi volonte sendus dankleteron."

Ni jam aperigis la nomliston de la mondonacintoj en la n-roj 2, 4 kaj 8 de 1994 (escepte de tiuj, kiuj volas resti anonimaj), tamen pro nesufiĉo de spaco ni ne publikigis iliajn adre-

sojn kaj pardonpetas pro tio. Sed ni volonte sendos la adreson de iu ajn el la publikigitaj nomoj al tiu, kiu skribis al ni kun tia peto, nur se la petata mondonacinto konsentos.

S-ro Gennadij Turkov el Rusio demandis en nia enketilo de 1994, kial ni ne publikigis la nomojn de tradukintoj, eĉ de tiuj, kiuj tradukis literaturaĵojn, kiel noveloj kaj poemoj.

Goje ni aprobas la opinion de s-ro Turkov, kvankam ni iam tion faris sed ne persistis. Ekde nun ni publikigos la nomojn de tiuj, kiuj tradukos novelojn aŭ poemojn por niaj venontaj n-roj.

La Red.

ENHAVO

- 2 *INTERNI*
 4 Hardi sin en malfaciloj
 7 Asekuro por sano de infanoj
 9 Tampereo kaj Sankt-Peterburgo, ĉi-jaraj kongresurboj
 10 Chen Shide — mentoro eterna
 14 *ORIGINALE VERKITAJ:*
 La komprenema kiso (Novelo)
 16 *POR KOMENCANTOJ:*
 Lampo en mallumo
 17 *ESP-NOVAĴOJ*
 18 Ensemblo de Lantian-infanĝardeno
 20 *REGIONO ĈIRKAŬ BOHAI-MARO:*
 Mara ekonomio disvolviĝanta
 24 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
 25 *BELECO DE ĈINIO:*
 Ĉarmo el plektaĵoj de tritika pajlo
 28 Kreinto de pigra kotono
 29 Varmaj gratuloj
 30 *FAMAJ URBOJ:*
 Hancheng, "Muzeo de Antikva Arkitekturo"


- 32 16 jaroj de la Baoshan-a Ŝtala Kompanio
 34 Ekskurso en stratetoj de Pekino
 36 *MULTNACIA ĈINIO:*
 De surlignaj signoj al moderna edukado
 38 Homo kaj lupoj sur dezerto (Novelo)
 41 *POR VIA SANO:*
 Masaĝo en la ĉiutaga vivo (V)
 42 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*
 Pri la publika moralo en Ĉinio
 44 *KURANTAJ AFEROJ*
 46 Impreso pri Jiaxing
 48 Ĉina tenisisto Xia Jiaping
 49 Vojaĝo al la Tri Gorgoj de Yangzi-rivero
 50 *GALERIO:*
 "Montoj kaj Rivero en Mil Li-oj"
SUR LA KOVRILO:
 Malgranda aktorino

Foto de Han Hong

- 2 Kolora ŝtono kun vejnoj
SUR LA DORSKOVRILO:
[ĈINAJ POŝTMARKOJ]
 Bambuo

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Arkta Vilaĝo (p. 4)
2. Jiaxing (p. 46)
3. Tri Gorgoj (p. 49)
4. Daming-gubernio (p. 25)



Hardi sin en malfaciloj

MARTE de 1994, gvidate de siaj instruistoj, 220 geknaboj de iu elementa lernejo de Dongcheng-distrikto, Pekino, piediris 15 km por viziti nove konstruitajn trefkruciĝojn de aŭtovojoj. Tio estis hardado por tiuj dorlotataj solinfanoj. Piedirinte 5 horojn, iuj el ili ekhavis blazojn sur piedoj kaj nemalmultaj ege laciĝis, irinte nur kelkajn km. Tamen tio multe gajigis ilin, ĉar en sia unuafoja longdistanca piedirado ili sukcesis.

Iu alia pekina lernejo organizis bravajn taĉmentojn, kiuj faris ekskurson. Antaŭe kiam la geknaboj faris ekskurson, iliaj gepatroj certe preparis por ili bongustajn manĝaĵojn, kiaj kolbaso, sekigita bovaĵo kaj ĉokolado, sed ĉi-foje ili nenion kunportis kun si. Antaŭ la ekskurso, ĉiuj taĉmentoj donis al si nomon, plenigis honoran karton kaj post tio tenante flagon piediris al iu studio for de la lernejo je dekoj da km. Tie ili rigardis rakontan filmon pri iu sportisto, kiu venkis sin mem kaj energie sin ekzercis por konkurso. Poste la geknaboj diris, ke la ekskurso, pri kiu ili fieris, estis nenio kompare kun la filma heroo.

Ne nur en Pekino, sed ankaŭ en aliaj lokoj oni okazigis similajn aktivadojn kun komuna temo: hardi la lernejanon en malfacilaj kondiĉoj, kulturi ilian spiriton elteni penigan laboron, altigi ilian kapablon sin prizorgi, flegi, regi kaj hardi en la malfaciloj.

La supre menciitajn aktivadojn kaŭzis artikolo "En Somera Tendaro", kiu raportis pri malsamaj montriĝoj de ĉinaj kaj alilan-

daj geknaboj en ekspedicio sur stepo. Intertempe, ĉinaj infanoj montris sin dorlotiĝaj kaj nekapablaj por elteni suferojn, mem aranĝi ĉiutagan vivon k.a. Tio vekis ardan diskutadon en ĵurnaloj kaj gazetoj kaj rekon sideron pri la ĉina edukado. Fakte, antaŭ longe edukistoj kaj prudentuloj de diversaj sociaj rondoj jam rimarkis tiujn mankojn de la solinfanoj. Tial la publikiĝo de la artikolo tuj vekis fortan eĥon. Oni konsciis la gravecon ŝanĝi la edukan metodon por ke la infanoj estu bravaj en la malfaciloj.

Sekve, okazis diversaj aktivadoj por hardi la infanojn. De 1994 ĝis la komenco de 1995, por pekinaj elementaj kaj mezgradaj lernejoj oni okazigis someran tendaron sur Pamiro, vintran tendaron en Arkta Vilaĝo, vojaĝon al Xisha-insularo sur Suda Ĉina Maro k.a.

Pamiro pli ol 3 000 m alta super la mar-nivelo troviĝas ĉe la okcidenta landlimo de Ĉinio. 10 pekinaj geknaboj el elementaj kaj mezgradaj lernejoj gvidataj de rilataj personoj transpasis Taklimakan-dezerton kaj post 2-semajna vojaĝo atingis Pamiron. Tio estis la plej peniga kaj riska ekspedicio por ĉinaj geknaboj.

Iu partopreninto rakontis en sia taglibro: "Nia aŭto spirale iris sur monta vojo, unuflanke de ĝi vertikale staras montpintoj, kaj aliflanke profundas abismo. Ni, kantintaj sur la tuta vojo, tiam silentis, kaj per larĝe malfermitaj okuloj rigardis eksteren tra la fenestroj. Subite granda ŝtono rule falis meze de la vojo antaŭ nia aŭto. Ho, kiel danĝere estis! Nur post kiam ni ĉiuj kune forpuŝis ĝin de sur la vojo, nia aŭto povis

daŭrigi sian iradon.”

Alia partopreninto skribis: “Kelkajn tagojn poste ni venis al Taklimakan. Ĉi tie la tersurfaca temperaturo superis 40°C, eĉ la aero estas varmega. Sur la dezerto ni marŝis kun 20 kg da pakaĵo sur la dorso. Tutaj en ŝvito, ni tamen ekhavis fendetojn sur la lipoj pro sekeco. Eĉ sur randaĵo de nia ĉapelo aperis ŝvitmakuloj. Malgraŭ ĉio tio, neni el ni postigis.”

Simila aktivado okazis ankaŭ en Turpan de la nordorienta parto de Xinjiang. Oni nomas Turpan fajra lando, la tiea temperaturo estis ĉ. 50°C. Eĉ en la ombro de arboj, oni sentis sin brulanta. Tamen transpasinte Taklimakan, la t.n. maron de Morto, la geknaboj nenion timis. Ili ĝoje sin amuzis kaj fotis.

Survoje al la landlima gardostacio sur Pamiro, la geknaboj plejparte suferis de vertiĝo kaj vomemo pro lacego kaj skuado

de aŭto post kelktaga rapida veturado sur grua vojo. Kun la dentoj kunpremitaj kaj larmoj en la okuloj, ili ĉiuj atingis Pamiron.

Ilia celo, la landlima gardostacio, estas loko, kie ofte ventegas. La vivkondiĉoj estis ege malbonaj: oni devis loĝi en malvarma kaj humida kelo, preni akvon de montpiedo distanca je du-taga piediro. Eĉ tiuj, kiuj jam alkutimiĝis al la loko, iras malfacile en la loko 5 000 m alta super la marnivelo, por ne paroli pri la geknaboj ĵus venintaj. Sper-tinte la hardadon en tiuj grandaj malfaciloj, la geknaboj larmis, adiaŭante la lokon.

Ankaŭ la informo pri vintra tendaro en Arkta Vilaĝo faris sensacion. En malpli ol duonmonato pli ol mil geknaboj sin anoncis por partopreni ĝin. Iuj gepatroj hezitis en tio, ĉar ili ne volis, ke la infanoj multe suferu, sed esperante, ke ili sin hardos en malfaciloj por altigi la vivipovon. Post pri-pensado, ili decidis sendi siajn solinfanojn

Ĉinaj geknaboj sur Yongxing-insulo de Xisha



06/13/03



Pekinaj element- kaj mezlernejoj sur Pamiro

en la vintran tendaron. La infanoj venis en la nordan ekstremon de Ĉinio, kie la temperaturo estas -45°C . En malvarmege ili faris gimnastikon kaj marŝadon, vojaĝis kaj aprecis la pejzaĝon de norda Ĉinio, sin hardante en malfacila vivo.

La menciitaj aktivadoj, kvankam utilaj al la kresko de la infanoj, daŭris tre mallonge. Kaj plie, ne ĉiuj geknaboj povis partopreni. Dank' al la scivolemo kaj entuziasmo, la geknaboj sukcesis en mallonga tempo. Plej grave estas, ke oni disvastigos kaj oftigos similajn aktivadojn.

Ĉiujare geknaboj de mezlernejo en Liaoning-provinco iris al kamparo alterne. En la pasinta jaro 300 geknaboj vivis en vilaĝo. Ili kune kun kamparanoj manĝis, loĝis kaj laboris sur kampoj, spertante la vivon de kamparanoj. En tiu mezlernejo la nombro de lernejoj, devenintaj de urbo, superis 95%, kaj plejparto de ili neniam vizitis veran kamparon.

Tiuj solinfanoj vivas komfortan vivon. Iuj el ili neniam lavis veston, nek aranĝis liton. Estis la unua fojo por multaj el ili fari

kampan laboron. Vidante maizon plukitan de ili mem, ili eksentis la dolĉon de la laborado.

Tiu mezlernejo donas grandan atenton al la edukado pri ideologio de la lernejoj kaj ilin ekzercas en fizika laboro por levi ilian laborkapablon. La lernejo faris tiun aktivadon en 3 jaroj kaj dank' al tio, la lernejoj sciis kiel mem vivi, helpi aliajn, trakti malfacilojn kaj malsukcesojn.

En hejmo, lernejo kaj socio, ĉie troviĝas ŝancoj por hardado. Por kulturi ilian laboran kutimon oni organizas ilin en kortobalaado, purigo de klasĉambro kaj necesejo. Lü Jiang, triaklasa mezlernejo, estas solfilo en la familio, liaj gepatroj lernigis al li de lia infaneco fari simplan mastrumadon. Dank' al sia diligenteco li fariĝis elstara lernejo kaj en persona kvalito kaj en lernado.

Oni esperas, ke aperos pli multe da geknaboj similaj al Lü Jiang, malproksimvidaj gepatroj kaj instruistoj.

YI XIU:

Asekuro por sano de infanoj

CIUJ amas siajn infanojn kaj neniu malzorgas ilian sanstalon, precipe kiam ili estas malsanaj. Tamen multaj gepatroj en Ĉinio ne povas elteni grandajn elspezojn por kuracado de siaj grave malsanaj infanoj. Kvankam gazetaro publikigis gravan malsanon de iuj infanoj kaj la socio faris ĝustatempe malavaran mondonaco, tamen la socia mondonaco solvas malfacilon nur de malmultaj infanoj. Oni maltrankvilas pri tio.

La maltrankvilo ne estas senkaŭza. En Ĉinio la neplenkreskuloj ricevas senpagan vakcination kaj escepte de tio ĉiun kuraccon devas pagi iliaj gepatroj.

En la 50-aj jaroj Ĉinio komencis praktiki novan kurac-sistemon, laŭ kiu la ŝtato kaj entreprenoj pagas kuracon de la ŝtatoficistoj, studentoj de altlernejoj kaj laboristoj de la entreprenoj de tutpopola posedanteco. Tamen hodiaŭ en Ĉinio ankoraŭ estas 300 milionoj da neplenkreskuloj, kiuj ne povas ĝui la favoron.

Sen kuraca garantio, la infanoj ne povas ricevi efektivan protektadon. Pro tio reformado de kurac-asekura sistemo estas senprokraste metita en la tagordon de la ĉina registaro. Marte de 1989 la Ŝtata Konsilantaro sankciis provon de la reformado

de kurac-asekura sistemo en Siping, Jilin-provinco, kaj en aliaj 3 mezgrandaj urboj. Septembre de 1991, sub la aŭspicioj de la magistrato, la Ruĝa Kruco kaj Asekura Kompanio de Ŝanhajo proponis al la geknaboj de la urbo asekuron pri enhospitala kuraco. Nun 2.8 milionoj da ŝanhajaj geknaboj, t.e. 95% de la tieaj geknaboj, estas asekuritaj je kuraco. En la pasintaj 3 jaroj 26 000 geknaboj ricevis kompencon.

S-ro Chu Yisuo estas taksiisto en Ŝanhajo. Lia monata enspezo estas nemulta. Lia edzino estas laboristino malforta kaj malsanema. En 1991 malfeliĉo trafis ilian familion. Ilia 9-jara solfilino estis atakata de leŭkemio. Kiel ili povis havi grandan mon-

sumon por pagi la kuracon!

S-ro Chu diris, ke li kaj lia edzino stuporiĝis antaŭ la abrupta informo kaj decidis vendi ĉion valoran en la hejmo por kuraci la filinon. Ili estis multe helpitaj de siaj amikoj. Oni ja scias, ke la kuraco de leŭkemio estas tre pagiga. Kaj iliaj bonkoraj amikoj ne povis doni al ili tiel grandan monsumon. La geedzoj estis multe turmentataj de la korŝira malfeliĉo. En tiu kriza momento ili sin turnis al la asekura kompanio, ĉar ilia filino iam pagis 6 juanojn por asekuro kontraŭ gravaj malsanoj.

La asekura kompanio donis grandan atenton al ilia malfeliĉo, senprokraste vizitis la malsanan infanon en la hospitalo kaj kompensis al Chu 39 000 juanojn por la kuraco. Kiam gesinjoroj Chu ricevis la monon, ili ne kredis, ke tio estas vera. Havante la monon, ili multe firmigis sian fidon pri resanigo de la filino.

La asekura laboro de la Ĉina Popola Asekura Kompanio cele socialan bonstatigon estas farata

Konsultiĝo pri asekuro





Laboranto de asekura kompanio (maldekstre) pagas por kuraci asekuritan infanon.

por enhospitala kuraco de grave malsanaj infanoj de la aĝo de unu monato ĝis 18 jaroj, kio malpezigas la ŝarĝon de la familio de la malsanaj infanoj. Tio estas grava progreso en la socia garantio de la infanoj en la 15 jaroj post ekpraktikado de la ekonomia reformado en Ĉinio. Antaŭ 3 jaroj la asekurato ĉiujare devis pagi 6 juanojn kaj en 1994 pro prez-altiĝo ĉiu asekurata infano devis pagi 10 juanojn (egale al 1.20 usonaj dolaroj). Pro malgranda pago la asekura agentejo ne povas profiti.

S-ro Mao Dongchu, estro de la homviv-asekura sekcio de la Ŝanhaja Agentejo de la Asekura Kompanio, diris: "Pro tia asekuro ĉiu asekurata infano povas ricevi kompenson por kuraco ĉu en ambulatorio ĉu en hospitalo. En la pasintaj 3 jaroj miloj da infanoj ricevis kompenson, sed ni neniom profitis. Tamen por solvi la malfacilojn de la popolo kaj protekti la sanon de la infanoj, ni volonte faras tiun labo-

ron."

Nun en 26 ĉinaj provincoj kaj municipoj oni asekurigas geknabojn por kuraco en hospitalo en malsamaj formoj kaj malsamaj gradoj. Nun la nombro de asekuratoj superis 10 milionojn.

Por kiel eble plej bone disvolvi la rolon de la asekuro, la asekura kompanio ellaboris severajn rimedojn por financaj aferoj. Ĝi ne celas profiti. Se estas superflua monsumo, ĝi estos uzata en la venonta jaro por formi apartan fonduson.

La urbaj infanoj povas ricevi ĝustatempan kuracon. Kiel do statas la kamparaj infanoj?

Jen ekzemplo. Sur insuleto en Yangzi-rivero vivas s-ro Chen Shizhong, kiu sin okupas pri kulturado de orangarboj kaj samtempe havas laboron en vilaĝa entrepreno. Lia solfilino estas 16-jara. En la Printempa Festo de 1993 ŝi estis atakata de akuta uremio kaj estis senprokraste veturigita en hospitalon por kura-

co. Semajnon poste, kuracisto diris al s-ro Chen, ke li devas pagi unue 30 000 juanojn por kuraco de sia malsana filino. Tio maltrankviligis lian tutan familion. Ĝuste en tiu momento la asekura kompanio solvis ilian malfacilon. Ĝi unuafoje pagis al li 40 000 juanojn kaj ĝis nun la asekura kompanio jam pagis 130 000 juanojn entute. La sanstato de la malsanulino jam stabiligis kaj ŝi revenis hejmen. Ŝi nun povas legi, rigardi televidon kaj promeni eksterdome. S-ro Chen diris: "Sen la asekura kompanio ni neniel akirus tiel grandan monsumon por pagi la kuracon, eĉ se ni vendus la domon."

Kompreneble, la supre menciitaj aferoj estas malmultaj. Tamen kun profundigo de la socia reformado kaj ekonomia disvolviĝo la kamparaj infanoj, same kiel la urbaj, sane kreskos asekurate por kuracado. ■

HAN PIN:

Tampereo kaj Sankt-Peterburgo, ĉi-jaraj kongresurboj

LA laŭjaraj Universala Kongreso de Esperanto kaj Internacia Junulara Kongreso (IJK) en 1995 okazos respektive en Tampereo de Finnlando kaj apud Sankt-Peterburgo de Rusio.

La finna E-movado havas longan historion. En 1922 kaj en 1969 dufoje okazis UK en Helsinki, la ĉefurbo de Finnlando. Estas la tria kongreso por gastiganto Finnlando la 80-a UK, kiu okazos de la 22-a ĝis la 29-a de julio.

Tampereo situas en la sudokcidenta parto de Finnlando, kun areo de 690 kvadrataj kilometroj kaj 175 000 loĝantoj. Ĝi kuŝas sur mallarĝa terkolo inter du lagoj. Ĝi estas unu el la ĉefaj industriaj, komercaj kaj kulturaj urboj de la lando. La oportuna situo faris ĝin grava trafikala nodo.

Tampereo estis fondita en 1779. Preskaŭ jarcenton ĝi sola en Finnlando povis ĝui la statuson de libera urbo. Pro tio ĝi rapide kreskis kaj fariĝis la unua industria centro de la lando. Ĝi ekutiligis elektran lumigon la unua en Norda Eŭropo en 1882. En 1923 ĝi starigis la unuan radiostacion de la lando. Same kiel Turkuo, la lulilo de la finna kulturo, kaj Helsinki, la finna administra centro, Tampereo estas la lulilo de industrio kaj tekniko de la lando. Ĝis la lastaj jaroj industrio ankoraŭ karakterizis la urbon, tamen la nuntempa industrio estas pli malgranda kaj aplikadas pintan teknologion.

Kvankam Tampereo estas industria urbo, tamen ĝi neniam fariĝis griza kaj malpura, dank' al la proksimeco de la naturo. En la urbo la naturo ĉiam kuŝas proksime, kiel ĉie en Finnlando. En ĝi troviĝas pli ol 180 lagoj, profundaj arbaroj kaj pli ol 170 bienoj. Krome Tampereo havas la plej belan naturan parkon de la lando, tuj en sia centro. Tampereanoj ŝatas sian urbon, en kiu multaj loĝas en unufamiliaj domoj.

Tampereo ne estas metropolo kun nubskrapaj domblokoj, nek malnova urbo kun antikvaĵoj. Mal-




Tie okazos la 80-a UK.

graŭ tio ĝi pli kaj pli reliefigas ankaŭ kiel kultura urbo. Tampere-Halo, inaŭgurita en 1990, estas la plej moderna konferenca kaj muzika centro en Finnlando. La 80-a UK okazos tie. La halo troviĝas en la urbocentro je duonkilometra distanco de la fervoja stacidomo. La hoteloj rezervitaj por la kongresanoj, tre bonkvalitaj, situas nur je piediro for de la kongresejo.

La E-movado naskiĝis en Tampereo en 1905, kiam fondiĝis Esperanto-Grupo de Tampereo. La nuna societo "Antaŭen" estas unu el la plej aktivaj en Finnlando kaj ĝia bulteno "Vekilo" legiĝas ankaŭ en aliaj landoj. Al malpli konata historio de Esperanto apartenas la veturo de d-ro Zamenhof tra Tampereo en 1914, kiam li revenis hejmen post la interrompita vojaĝo al la UK en Parizo, nuliĝinta pro la milito. Ĉi-jare estas la 50-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj. Lige al tio, la kongresa temo estas "Ni, la popoloj" — unu mondo aŭ disaj eroj". Dum la kongreso oni organizos modelan UN-Asembleon.

Post la UK en Tampereo, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto okazos apud Sankt-Peterburgo la 51-a Internacia Junulara Kongreso, kiu estos la unua kongreso de TEJO sur la rusa tero.

Sankt-Peterburgo estas fama havenurbo ĉe la orienta bordo de la Finna Golfo. Tiu ĉi dua plej granda urbo de Rusio estas nomata "rusa fenestro al Eŭropo" kaj "lulilo de tri revolucioj". Se vi partoprenos la kongreson, vi havos ŝancon viziti la famajn vidindaĵojn de la urbo kaj ties ĉirkaŭaĵojn. Dum la kongreso vi rajtos mem elekti ĉu romantikumi en tendo, ĉu senzorgi en ĉambro. La kongresa temo estas "Aktivismo: Junularo, kiu ne nur dancas." ■



S-ro Chen Shide

Chen Shide — mentoro eterna

de WANG HANPING

MARTE Pekino jam elspiris primaveron. Kiel kutime ni estas okupitaj pri eldonado de la revuo *El Popola Ĉinio*. Tute ekster nia atendo, malĝojega informo frapis nian koron: Chen Shide forpasis antaŭtagmeze de la dua de marto. Tio preskaŭ ne kredeblis por ni, kiam ni rememoris la renkontiĝon kun li antaŭ tri monatoj. Tiam li fartis bone. Kun optimisma karaktero kaj klara pensado li aspektis multe pli juna ol 90-jara li estis fakte. Iom poste, mia kolego diris, ke li enhospitaliĝis pro malboniĝinta sanstato. Mi pensis, ke li certe resaniĝos kiel plurfoje antaŭe. Ni atendis pacience. Tamen ho ve! Ĉifoje li ne revenos plu inter nin por ĉiam.

En la Esperantujo de Ĉinio, Chen Shide estis laŭdata de ĉiuj pro siaj eminenta personeco kaj gravaj kontribuoj al Esperanto-movado. De pli ol 60 jaroj li diligente dissemis Esperanton, kaj liaj lernantoj troviĝas ĉie tra la lando. En lia tuta vivo montriĝis la malglata vojo de la ĉina Esperanto-movado. Li estis rezoluta kiel batalanto kaj persistema kiel klerulo. Kun entuziasmo, grandanimeco kaj indulgemo li frontis al la vivo. Nun li for-

lasis nin. Tio sentigis al ni profundan doloron kaj bedaŭron.

Estante juna novico en Esperanto-movado mi konatiĝis kun Chen Shide antaŭ nelonge. Jam en miaj studentaj jaroj en la Nankina Universitato mi sciis lian nomon. Tiam li servis kiel prezidanto de la Jiangsu-a Esperanto-Asocio, kaj ĝuste en tiu tempo mi eklernis Esperanton instruate de la lernanto de lia disĉiplo. Mi konatiĝis kun li nur antaŭ 6 jaroj, post kiam mi venis al Pekino kaj eklaboris en la redakcio de *El Popola Ĉinio* kiel raportisto kaj redaktisto. Kaj de tiam oftigiĝis la kontakto inter ni, kaj mi estis multe favorita de tio. Iom post iom riĉiĝis ankaŭ miaj scioj pri li.

Chen Shide naskiĝis en la jaro 1905, en la urbo Suzhou de la provinco Jiangsu. En 1928 li esperantistiĝis. Zensto estis lia nomo Esperante. Ĝi identiĝas kun lia ĉina nomo prononce kaj aŭdiĝas sonore.

Ĉirkaŭ la jaro 1930, Chen Shide laboris kiel redaktoro de la revuo de la ŝanhaja telekomunika rondo. Li aranĝis en la revuo Esperanto-rubrikon, kaj per tio propagandis kaj disvastigis nian lingvon. Venkinte multajn malfacilojn, li kompilis la aŭtodidaktikan materialon de Esperanto.

En ĉiu semajnfino li veturis de Ŝanhajo al Suzhou, kie li instruis Esperanton en iu biblioteko. Tiam s-ro Hujucz ĵus revenis al Ĉinio post la vizito al Sovetunio, kaj invitite de Chen Shide li faris prelegon en Suzhou. Post tiu prelego, la nombro de la lernantoj de la dimanĉa Esperanto-kurso gvidata de Chen Shide atingis proksimume cent.

En la fino de 1931, Chen Shide, kune kun Hujucz, Zhang Qicheng kaj aliaj, iniciatis la Ĉinan Proletan Esperantistan Union, kaj servis kiel respondeculo de la esplora fako de la unio. La mimeografita "Proletara Esperanto-koresponda Mesaĝo" siatempe estis tradukita kaj presita en lia hejmo.

En 1933 li organizis en Suzhou la Esperanto-societon, poste fondis la monatan revuon "Tagiĝo". En 1936, li establis la tutpopolan cirkulan bibliotekon de Suzhou, kaj faris la propagandadon por batalo kontraŭ japanaj agresantoj, unuigante kun nombro da esperantistoj kaj junuloj. Sekve de la kontraŭjapana naci-sava movado, li vojaĝis al diversaj lokoj de la lando, kiaj Yangzhou, Changsha kaj Chongqing. Kien li iris, tie li semis Esperanton. En 1938 li starigis Changshan Esperantistan Asocieton en la

provinco Hunan. Poste li funkciigis Esperanto-kurson en la urbo Chongqing de la provinco Sichuan. En 1950, fondiĝis la Chongqing-a Esperantista Asocio kun li kiel la prezidanto.

En 1952 Chen Shide transpostiĝis al Pekino kaj eklaboris en la Ĉina Esperanto-Ligo kiel la sekretario. Li ĉiam fervore kaj detale respondis al tiuj, kiuj alsendis leterojn por informiĝi pri Esperanto aŭ lerni Esperanton. Li eĉ sendis al ili lerno-librojn. Poste li laboris en la redakcio de El Popola Ĉinio, jen tradukante, jen instruante en la Esperanto-kurso. En 1963, la Ĉina Alteduka Ministerio organizis nombron da junaj instruistoj el 11 ĉinaj universitatoj kaj funkciigis, en la Ĉina Popola Universitato de Pekino, Esperanto-kurson, kiun gvidis li kaj Venlo Fon. Diplomitiĝinte, la kursanoj revenis al sia propra universitato kaj instruis Esperanton kiel nedevigan lecionon. Tio metis la bazon por formiĝo kaj disvolviĝo de la Esperanto-movado en ĉinaj altlernejoj. En 1964, Pekina Radiodisaŭdiga Instituto okazigis Esperanto-kurson kun li kiel la instruisto de la konversacia leciono. La diplomitoj plejparte fariĝis profesiaj esperantistoj. Iuj el ili laboras en la redakcio de El Popola Ĉinio, aliaj en la Esperanto-sekcio de Ĉina Radio Internacia. Pasis 30 jaroj, liaj lernantoj jam fariĝis elitoj de la ĉina Esperanto-movado.

En 1969, Chen Shide revenis al sia hejmloko Suzhou, kie li daŭrigis sian plugadon por Esperanto. Influate de li, ankaŭ liaj du nepoj esperantistiĝis. Ili fondis la Esperanto-grupon Fenikso kaj aktive impulsis la movadon.

En la komenco de la 80-aj jaroj, malgraŭ sia aĝo de ĉ. 80 jaroj, Chen Shide plifortigis sian klopodadon por revigligi la Esperantomovadon en Suzhou kaj la provinco Jiangsu. Fine, restariĝis la Suzhou-a Esperanto-Asocio, kaj

plue, fondiĝis la Jiangsu-a Esperanto-Asocio en 1983. Gvidate de li, la Esperanto-movado de Jiangsu impetis vigleplene kaj fruktodone. En 1984, li revenis en Pekinon kaj vivis kun la filina familio. Li estis vicprezidanto de la Pekina Asocio de Veteranaj Esperantistoj.

En la lastaj jaroj, li iom post iom malfortiĝis. Antaŭ du jaroj li jam ĉesis aliĝi al sociaj aktivadoj. Tamen, neniom paligis lia profunda amo al Esperanto. Li daŭre korespondadis kun samideanoj kaj legis periodaĵojn en Esperanto.

Chen Shide donis multajn zorgojn al junaj esperantistoj. Ĉiufoje, kiam ni vizitis lin, li ĉiam kun granda intereso aŭskultis niajn rakontojn pri la lernado, vivo kaj laboro, kaj stimulis nin daŭre strebi antaŭen. En la pasinta duonjarcento, li estis instruanto kaj vojkondukanto por multaj junuloj. En la lastaj sinsekvaj jaroj, okaze de lia naskiĝtago, liaj lernantoj junaj kaj ne-

junaj en Pekino, ĉiam kolektiĝis en lia hejmo por esprimi al li gratulon kaj bondeziron. Mi memoras, ke en novembro de la pasinta jaro, t.e. la lasta datreveno de lia naskiĝo, ni ĉiuj gaje sidiĝis ĉirkaŭ li, sate babilis pri la pasinteco, estonteco, vivo kaj laboro. Li estas nia instruisto kaj ankaŭ nia bona amiko. Tiutage ankaŭ li estis tre ĝoja, perfekte parolante en Esperanto, kun klara pensado. Neniu atendis, ke tio estis nia lasta gratulo al li por la naskiĝtago.

Chen Shide sindoneme dediĉis sian tutan forton kaj energion al la ĉina Esperanto-movado. Ĉiuj respektas kaj konfidas lin pro liaj serena karaktero, honesta personeco kaj indiferenteco al famo kaj profito.

Chen Shide forpasis, ni ne povas aŭdi plu lian instruon. Tamen, liaj senmortaj spirito kaj merito ĉiam kuraĝigas nin antaŭen! ■

S-ro Chen Shide (la unua de maldekstre en la malantaŭa vico) kaj aliaj partoprenantoj de la prepara kunveno por fondi la Suzhou-an Esperanto-Asociacion en 1931






S-ro Chen Shide donis salutvortojn en la fondkunveno de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio en novembro 1982.

S-ro Chen Shide festas sian 90-jariĝon kun siaj lernantoj kaj pekinaj e-istoj.





S-ro Chen Shide kaj s-ro William Auld en 1989

Lernantino de s-ro Chen Shide salutas lin.



La komprenema kiso (Novelo)

de SHI CHENGTAI*

AVAN certe ĝojis, sciante ke lia edzino promociiĝis. Rigardante al la gagatnigraj okuloj kun longaj okulharoj de la edzino, Avan humure diris: “Nun mia birdeto jam fariĝis potenculino, fera virino, ne bezonas plu mian protektadon...” Sed la edzino ankoraŭ kun ĉarma rideto tuj detranĉis mildkvere lian parolon: “Ne, via sino ĉiam estos mia varma nesto...”

Tamen, de kiam la edzino funkciis kiel ĉefdirektorino de la hotelo “Ora Drako”, ŝi ĉiam hastis pro la profesia laboro; la akceptado kaj adiaŭado al gastoj forrabis ŝian plejparton da tempo, eĉ Avan tre malfacile kaptis ŝancon por kunmanĝi kun sia iama “birdeto”. Precipe, dum la semajnfinoj aŭ festaj tagoj, li sidis sola en la ĉambro, nur per la rigardo trafis la verdetan fenestrokurtenon, revante, ke lia “birdeto” enflugus tra tiu fenestrogazo. Li ofte dronis en rememora miraĝo: kiam ili ĵus falis en reton de la unua amo, ŝi ofte flugis antaŭ lia fenestro, kiel birdeto, kaj leĝera pordfrapado ravis lin. Li ovris la pordon, aŭskultis ŝian anheleton, tiam ŝi pugnadis lian bruston, grumblante: “Vi, aĉulo, kaŝante vin en la ĉambro, ne akompanis min dum vojo, deziras vidi mian timeman aspekton...” Kaj Avan arde brakumis tiun belan junulinon, rekte rigardante la ĉarman okul-paron kun longaj okulharoj, rukulis: “Ne timu! Dum la tuta vivo mi ĉiam estos via sekura nesto.” Kapjesis ŝi, la brilaj larmoperloj ruliĝis sur la longaj okulharoj.

Sed fine forpasis tia bela tempo de la unua amo.

Nun ŝi jam forĵetis la protektadon de la edzo, kiel potenculino. Ŝia parolo ankaŭ perdis birdtrilan teneran tonon. Avan protestis: “Nia hejmo ne estas via hotelo, la babilado ne fariĝu ordona diktado, ĉu bone?” Ŝi estis en nebulo: “Kiel mi parolu laŭ vi?” Kompreneble li povis deklari: “Nu, per tenera, softa, belsona tono...” “Lasu! Mi scias, ke vi preferas, ke mi ĉiam estu dependa de vi kiel birdeto kaj restu en via nesto.” Tia kverelo al ili ne mankis, kvankam ili strebis dolĉigi sian nestan vivon.

Tiutage la edzino revenis hejmen pli frue ol kutime, eĉ kunportis grandan brioĉon. Avan surpriziĝis, demandante: “Por kiu?” La edzino respondis: “Ĉu vi forgesis, ke hodiaŭ estas via naskiĝtago? Mi revenas frue por gratuli vin kaj kune kun vi pasigi ĉi tiun belan nokton. Jam delonge ni ne bonorde kunmanĝis, kaj mi ofte sentas min kulpa al vi...” Avan, dorlotate, lirlis: “Ĉu vere, via ĉefdirektorina moŝto?...” La edzino interrompis lian parolon: “Mi scias, ke mi multe ŝuldas al vi. Ĉi-vespere mi certe faros min via birdeto, nu, ne kverelu! Ĉu?”

La aero en la ĉambro eĉ tuj freŝiĝis. Amzefiro dolĉe blovis en la koron de Avan, kaj la koketa mieno de la edzino, kiel bela lunbrilo, lumis antaŭ liaj okuloj. Li sentis sin en la arda ama helo, lia koro plenis de amdelico. Kiam lia edzino bruligis 35 kandelojn per graciaj fingroj, en la ĉambro ŝvebis romantika emocio. Avan tuj forgesis ĉian ĉagrenon, kiun li havis, dum li ofte restis sola hejme sen ĉeesto de la edzino...

La edzino difuzis sorĉan mildecon. Ŝajnis al Avan, ke ĉi-nokte ĉio en la mondo favoris lin, eĉ lunlumo kaj cikadĉirpado plenis de amemo. La edzino diris: “Ĉi-nokta ĝojo faras nin la plej feliĉa paro sur la mondo.” Ili forte ĉirkaŭprenis sin reciproke, samkiel en la unua amo, kolombumis multe. La edzino diris: “Kiam mi akiros pli pompan sukceson en mia profesia laboro, mi certe naskos amindan knabon por vi.” Avan emocie ĉhis kapjeson.

Ili estingis la kandelojn, la lunlumo lante fluis tra verdeta fenestrogazo, stompis poezian etoson de la ĉambro. La edzino ektranĉis la brioĉon. Ĝuste tiam la telefono eksonoris. Avan prenis la aŭdilon kaj diris al la edzino: “Oni parolos al vi...” La edzino transprenis la aŭdilon. Tuj kiam ŝi aŭskultis la parolon, sur ŝia vizaĝo aperis embaraso, kaj ŝi murmuris al Avan: “Mia kara, nia hotelo aranĝos bankedon por honoraj gastoj. La fabriko Yangzi traktas kun investantoj el Hongkong, la urbestro diris, ke mi nepre ĉeestu...”

Avan esprimis tutan komprenemon, dirante: "Nu, vi ĉestu, ĉar la afero estas pli grava ol la familio."

La edzino prenis mantelon kaj kun pardonpeta rideto diris: "Dankon pro via tolerema komprenemo!"

Post foriro de la edzino Avan denove dronis en soleca silento. La lunlumo malheliĝis, cikadĉirpado ĉesis, en la ĉambro nur ĉagreno kaj bedaŭro sieĝis lin.

Avan vespiris kaj pensis, ke oni eble nur envias lin pro lia potenco edzino, fakte, kiu povas scii lian ĉagrenon? Li eĉ deziris, ke la edzino ne estu plu "fera virino", restu malforta birdeto, aŭ almenaŭ ili havu ordinarajn tagojn, dum kiuj ili ameme kunvivos, kiel hodiaŭ, en lia naskiĝtago...

Subite la telefono tintis. Li stupore sidis plu. Tamen la telefontintado obstinis. Li prenis la aŭdilon, el kiu aŭdiĝis arĝenta voĉo: "S-ro Avan, bonan nokton. Bonvolu tuĝ alveni, ĉe la noktoklubo Marondo iu atendas vin!"

La soleco ne kapablis venki tenton de invito. Avan pensis: ol resti sola en la hejmo mi preferas ekstere distri min.

Li alvenis. Sed ĉe la pordo de la noktoklubo neniun li renkontis. Hezite li rigardis la buntajn neonlampojn. Subite tra la lampbriloj eksaltis grupo da junulinoj, kiuj enmane tenis po unu faskon da akoroj, haha-is, hihi-is, unu post alia gratulis lin: "S-ro Avan, Ĝojan Naskiĝtagon!"

Konfuzite de tia gaja sceno, Avan gapis al tiuj ĉarmaj junulinoj. Iu sveltulino, kiu ŝajne estas la estrino de sekcio pri la publika rilato en la hotelo de la edzino, ĝentile diris kun sorĉa rideto: "Nia ĉefdirektorino estas okupita, ŝi ne povas akompani vin ĉi-momente kaj ordonis, ke ni akompanu vin por vin plezurigi." Avan, favorata de tiuj gajaj ĉarmulinoj, eniris la klubon kune kun ili.

Avan vigliĝis. Tiom da junulinoj kaj tiom da belaj florfaskoj certe donis al li feliĉon. Pro ilia sincereco kaj gajeco li en la koro multe dankis sian edzinon.

Tiun nokton li pasigis kun tiuj gajaj junulinoj, kiuj konkure invitis lin danci. Avan ne lerte dancis, tamen en ekzalta etoso, kiun la junaj belulinoj faris por li, li sufiĉe kontentis, eĉ sentis sin la Princo sur Blanka Ĉevalo en fabelo. Li opiniis, ke tiu nokto ja estas la plej gaja naskiĝtaga nokto por li.

La nokto jam profundigis. Homoj disiĝis sub la buntaj neonlampaj lumbriloj. Avan adiaŭis la junulinojn, dirante: "Dankon al vi pro viaj favoroj al mi!" La junulinoj disflugis, kiel gajaj birdoj. Li paŝis

eksteren kun dolĉa remaĉado pri la pompa sceno en la dancejo. Ĝuste kiam li descendis ŝtuparon, li trovis sian edzinon, kiu staras ĉe la pordo por atendi lin. Rimarkinte la laciĝan mienon de la edzino, Avan sentis iun mankon en sia vivo. Ĉu li povos posedi ĝojplenan kunvivadon dum sekvontaj tagoj? Kiel viro, li pli bezonas ordinaran familian vivon... La edzino demandis: "Ĉu vi bone travivis tiun ĉi nokton?" Ŝi atentis la ŝanĝiĝon sur lia mieno kaj plu konsolis: "Ne estu tiel trista. Rigardu, ke la lunlumo estas tiom hela kaj ĉarma, via birdeto akompanas vin reveni al la hejmo, mia feliĉa nesto."

Avan ree en feliĉan torenton sinkis kaj vole forĝetis tiujn ĉagrenajn kaj bedaŭrajn ideojn. Kun la profunda amo al sia edzino li klare konsciis, ke la edzino ankoraŭ profunde amas lin, tio sufiĉas! Li alproksimiĝis al la edzino kaj metis manon sur ŝian ŝultron. "Mia kara birdeto, vi ja estas mia plej kara! Por via komprenemo mi devas doni al vi rekompencan!"

La edzino kokete proksimiĝis sian vangon al la lia. Li kun pasia ardo kisis ŝin longe, longe. "Nu, la komprenema kiso al vi..." li delire murmuris. La edzino sentis lian sinceran ardon kaj respondis al li per pli stringa apogo al li. Avan en la koro diris al si mem: en sia vivo oni posedas tian sinceran amon, kial oni nepre pli posedus la tutan tempon kaj energion de sia edzino? La edzino devas posedi la pompon de sia afero, ankaŭ tio estas lia fiero! La amo de "fera virino" ja estas pli valora, pli firma ol oro...

Certe la lunlumo sorĉis kaj drapiris tiun paron revenantan al sia dolĉa nesto. ■

*La aŭtoro naskiĝis en 1939 en la urbeto Tailai de Qiqihar, Heilongjiang-provinco, kaj laboris kiel laboristo, lignaĵisto, instruisto kaj direktoro de lernejo por surdmutaj knaboj. Li esperantistiĝis en 1958 kaj ekde 1979 ĉiam viglas en E-movado. Li estas prezidanto de la Qiqihar-a E-Asocio kaj komitatano de ĈEL. Liaj multaj poemoj, noveloj kaj prozaĵoj, originalaj kaj tradukitaj, aperis en Esperantaj periodaĵoj, ĉefe en beletraj revuoj.

La aŭtoro en prelego



Lampo en mallumo

EN iu printempo miaj kruroj estis rompitaj en trafika akcidento. Doktoro diris, ke lameco estos neevitebla. Mi rigardis al la plafono tutajn tagojn kaj larmoj fluis senhalte. Kion mi povis fari krom tio?

Mia fratino, kiu instruis muzikon en elementa lernejo, portis al mi lernolibrojn por mezlernejoj kaj metis ilin apud mian kap-

kusenon. En kolero kaj malespero mi jetis ilin sur la plankon. La fratino levis ilin unu post alia. Pezaj larmoj falis el ŝiaj okuloj. Mi ploregis de malĝojo.

Iun nokton subite venis la fratino. Ŝi sidigis min, montris al mi la transan domon kaj diris al mi kun ekscitiĝo: "Fraĉjo, ĉu vi vidas la fenestron, la duan de maldestre de la tria etaĝo?" Ŝi diris al mi, ke tie loĝas paralizigiinta

knabino kaj ŝia blinda patrino. Tage la knabino faras kartonajn skatolojn por iu fabriko kaj diligente lernas vespere. Ŝi havas 17 jarojn kaj publikigis jam multajn verkojn. Rigardante al la lamplumo de la fenestro, mi dronis en silento.

"Fraĉjo, estu kuraĝa!"

De tiam mi estis ĉiam akompanata de la lamplumo el la fenestro. Kiam eklumiĝis la lampo, mi elprenis librojn el sub la kapkuseno kaj komencis legi.

En iu pluvega posttagmezo mia fratino oferis sian vivon por savi knabon, kiu falis en akvon. Mia tuta familio dronis en malĝojo.

Mi sendormis en la lito kaj larmis. Subite milda lamplumo falis sur mian vizaĝon. Mi ekvolis viziti la knabinon. Mi volis rakonti al ŝi pri mia fratino kaj diri al ŝi mian dankon, ke ŝia lamplumo akompanis min dum longa malfacila tempo. Pere de lambastonoj mi malfacile grimpis supren en la transa domo kaj malpeze frapis je la pordo.

Neniu respondis, kaj mi frapis pli forte. Sed malfermiĝis la pordo de alia ĉambro kaj min alparolis afabla avino: "Ne frapu plu, mia infano. Tiu estas vaka ĉambro."

Mi miris kaj ŝi klarigis al mi:

"Antaŭe mia filo loĝis en tiu ĉambro, kaj poste li havis alian loĝejon kaj tiu ĉambro fariĝis vaka. Antaŭ kelke da monatoj fraŭlino kun longaj harplektaĵoj venis kaj luis la ĉambron. Sed ŝi ne loĝis ĉi tie kaj nur petis min ŝalti la lampon vespere kaj malŝalti ĝin en la sekvanta mateno..."

Mi forpuŝis la lambastonojn, falis teren ĉe la pordo kaj ekploregis. Ĉe miaj oreloj kvazaŭ aŭdiĝis la voĉo de mia fratino:

"Fraĉjo, estu kuraĝa!"



ESP-NOVAĴOJ

● Por vigligi la E-movadon en Liaoning-provinco, la Liaoning-a E-Asocio starigis marte de 1995 laborsekciojn de junularo, internacia ekonomia komerco kaj turismo, internacia scienc-teknika kaj kultura interŝanĝo. Ili volas kontaktiĝi kaj kunlabori kun ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj. La adr.: P.O. Kesto 778, Shenyang, Ĉinio, 110034.

(ID Yang)

● Januare de 1995 la popola registaro de Henan sankciis Esperanton kiel unu el la fremdaj lingvoj en ekzamenoj por promocii Henan-ajn funkciulojn al meza kaj supera titoloj. Pro tio la Henan-a E-Asocio organizis Esperantan juĝkomisionon, kies ĉefo estas Zhang Haoguang.

● 96 katalunaj esperantistoj celebris la 135-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. Pere de du aŭtobusoj ili vizitis du muzeojn en Barcelono: la muzeo de la Monaĥejo de Pedralbes, kie ili admiris la faman pikturan kolekton "Thysen", kaj la Olimpika Galerio, muzeo de ornamadoj uzitaj dum la malfermo kaj fermo de la Olimpiaj Ludoj en Barcelono en 1992.

En la strato D-ro Zamenhof en Barcelono ili metis florbukedojn sub la nomtabulon de nia majstro. Post la komuna fotado ili finis la aktivadon per komuna manĝo en restoracio. (Marti Guerrero Cots)

● Finiĝis la 2-a Internacia Kultura Esperanto-semajno. Ĝi disvolvigis en Sant Cugat del Valles, Barcelono, de la 15-a ĝis la 22-a de

Partoprenantoj de la Zamenhofa Festo en Barcelono en 1994



oktobro 1994. Unu el la plej gravaj aranĝoj estis la Esperanta kurso, gvidata de la itala samideanino Carla de Lorenzi. Sep prelegoj, tri ekskursoj, amuzaj artaj vesperoj, ktp. Oni jam eklaboris por la venonta Esperanto-semajno, kiu okazos de la 4-a ĝis la 11-a de novembro 1995 en la belega urbo Salou, Tarragona, apud Mediteraneo.

(Marti Guerrero Cots)

● Kadre de la Trilanda Renkontiĝo (23-a de oktobro 1994, Comblain-au-Pont Belgio) okazis ankaŭ ĝenerala asembleo de iom eksterordinara asocio fondita la 17-an de oktobro 1993 en Kelmis (orienta Belgio). Nun tiu ĉi asocio donis al si definitivajn statutojn kaj nomon: Senlime. La celo de tiu ĉi nova organizaĵo estas: plifortigi la interpopolan interkompreniĝon helpe de la internacia lingvo Esperanto, precipe en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Specifaĵo estas evidenta, ke temas pri teritoria unuiĝo ampleksanta partojn de tri suverenaj ŝtatoj: la Eŭregionon Mozo-Rejno, kiu kovras la belgajn provincojn Lieĝo kaj Limburgo kaj grandajn partojn de la nederlanda provinco Limburgo kaj de germana distrikto Kolonjo. La ĉefa aktivado konsistas el organizado de Trilandaj Renkontiĝoj, kiuj havas jam pli ol 60-jaran tradicion. La venonta Trilanda Renkontiĝo okazos en Valkenburg, Nederlando, 07. 05. 1995. Adreso de la asocio: Houtstraat 60, NL-6343 BL Klimmen.

● Inter la 1-a kaj 7-a de julio 1995, la Hungara Esperanto-Oficejo de "Movilo" organizos Esperanto-

Lingvotendaron por ĉiuj generacioj en boatejo — Szazhalombatta. Krom 5×3-hora lingvoinstruado, estos ankaŭ ekskursoj, interkona kaj adiaŭa vespero, bivako, strandumo, boatado ktp. Partoprenkotizo kun tranoktoj, plena pensio kaj ĉiuj programeroj: USD 120, por grupoj kun propra buso: USD 110. Aliĝo al: MOVILLO, Eszperanto Rendezveny, Iroda 1157 BP, Nyirpalota Ut 107, Hungario.

● ILTIS-eldonejo intencas eldoni post kolektado de sufiĉa nombro da antaŭmendoj: Tri verkojn de Karolo Piĉ: 1) La interna vivo de Esperanto. Eseoj. 400 p. antaŭmenda prezo DM 51,-. 2) Ordeno de verkistoj. Romano. 380 p. antaŭmenda prezo DM 51,-. 3) Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto. 531 p. antaŭmenda prezo DM 63,-. Temas pri represoj de la originalaj tajposkriboj de la aŭtoro: 4) Teo Jung: Landoj de l' fantazio. Originala romano. 323 p. antaŭmenda prezo DM 39,-. la antaŭmenda prezo validas ĝis la 30-a de junio 1995. Adreso: Postfach 600130, D-66067 Saarbrücken, Germanio.

● Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (OSIEK) atendas viajn proponojn por OSIEK-premio 1995. Povas konkursi fakaj, ne beletraj verkoj pri ĉiuj natursciencoj, homsciencoj aŭ literatursciencoj, pri matematiko, historio, filozofio, esperantologio ktp. Por oficiale proponi premiindajn verkojn necesas esti membro de OSIEK. Membrokotizo egalvaloras 25 poŝtmarkojn por letero en via lando. Por aliĝi kaj proponi unu aŭ du verkojn skribu al OSIEK, 50 rue Haute, F-57210 FEVES, Francio. Aliĝkotizoj precipe pagas la premion, kiu nuntempe valoras 300 ekuojn. Jam kvin verkoj estis premiataj inter 1990 kaj 1994: Zamenhofa ekzemplaro de Rihej Nomura; Mil jaroj de kristana filozofio de Evaldo Pauli; Etimologia vortaro de Esperanto de Ebbe Vilborg; La danĝera lingvo de Ulrich Lins; Esperanta bildvortaro de Rudiger Eichholz. Voĉdonado por elekti inter la proponitaj verkoj okazos en Varsovio, de la 15-a ĝis la 21-a de julio. Aliĝilo al la Konferenco haveblas ĉe OSIEK.

ENSEMBLO DE LANTIAN-INFANĜARDENO

Fotoj de HAN HONG

En la Printempa Festo de 1995 la ĉinoj televidis, ke grupo da gajaj infanoj ascendis la scenejon kaj prezentis la dancon "Gajaj Infanoj en Printempo". Tiuj infanoj ja estas la malgrandaj aktoroj de la Ensemblo de Lantian-infanĝardeno.

La ensemblo estis fondita en 1982 kaj konsistanta el 4-6-jaraj infanoj. La infanoj jam prezentis ĉirkaŭ 200 programerojn kaj ofte ludis en televidaj programeroj. Ilia naiva seriozeco en la prezentado vekis vastan laŭdon de la rigardantoj.

Sur la scenejo la infanoj ludis tiel serioze, kiel plenkreskuloj. Sed ilia ludado ankoraŭ karakteri-

ziĝas per naiveco. En la danco "Gajaj Infanoj en Printempo" la infanoj portis tradician nacian kostumon, kun kapharoj komike kombitaj. La rigardantoj povis facile kompreni la prezentadon. La danco "Knabinetoj en Montaro" prezentita iom komike similis al tradicia ĝenro.

La ensemblo ofte ŝanĝas siajn aktorojn, kaj la instruistoj multe penis por la infanoj. La infanoj fariĝis pli spritaj, pli saĝaj kaj pli viglaj dank' al la lernado de kantado kaj dancado. Kiam ili eniris en elementan lernejon, ili ĉiuj estis sanaj kaj diligentaj en lernado. Iuj el ili jam eniris en artan lernejon.

Interesa distraĵo



"Mi helpu vin."





La danco "Gajaj Infanoj en Printempo"

La danco "Knabinetoj en Montaro"



Instruistino kaj infanoj



Mara ekonomio disvolviĝanta

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de HAN HONG

LA regiono ĉirkaŭ Bohai-maro kun marbordo de pli ol 5 800 km abundas je maraj riĉfontoj. Kun la disvolviĝo de modernaj sciencoj kaj teknikoj, la mara industrio disvolviĝas de la tradicia salfarado al mara transportado, ekspluatado de mara petrolo, kulturado de markreskaĵoj, kemi-industrio kaj elektro-produktado kaj marborda turismo.

Ĉi artikolo temas nur pri la mara ekonomio de Shandong-provinco, tamen montras, ke ekspluatado de mara ekonomio jam fariĝis nova elirpunkto por la ekonomia disvolviĝo de la regiono ĉirkaŭ Bohai-maro kaj la aliaj marbordaj regionoj de Ĉinio.

INGENIERIO POR "PRENI ORON EL MARO"

En Changdao-gubernio cirkulas legendo: Kap-tante fiŝojn en la maro, iu fiŝisto akiris el ĝi pezan oran pelvon. De tiam la fiŝisto ne plu mizeris, ĉar la ora pelvo kontentigis lin per ĉio, ĉu frandaĵoj ĉu belaj vestoj. Nun la legendo fariĝis realaĵo. La fiŝistoj de la gubernio havas ne nur komfortan loĝejon, sed ankaŭ bonajn manĝaĵojn, vestaĵojn kaj meblojn. Se en la mondo estus la ora pelvo menciita en la legendo, do ĉiuj fiŝistaj familioj de Changdao havus oran pelvon nun.


Changdao-gubernio el 32 diversgrandaj insuloj situas en la plej norda parto de Shandong-provinco. Kiam mi ŝipveturis tien de Penglai, mi vidis vicon post vico da apogiloj ambaŭflanke de la navigvojo, kiuj etendiĝis malproksimen. Motorboatoj navetis inter ili.

S-ro Kong, kiu atendis min ĉe la bordo, konigis, ke en la maro ĉe Changdao vivas multaj fiŝoj, konkuloj kaj algoj, kiaj holoturio, halioto (*Haliotis*), pekteno kaj salikoko, tamen estas limigitaj la naturaj maraj riĉfontoj. Sekve de tio, en la lastaj jaroj Changdao turnis grandan atenton al kulturado de markreskaĵoj. Post plurjara penado, la nombro de specoj de maraj kreskaĵoj en la gubernio kreskis de 2 al pli ol 20 kaj 40 000 hektaroj da marsurfaco ĉirkaŭ la insularo estis kultivataj.

Laminarioj estas kulturataj sur 667 hektaroj kaj ilia jara eksporto-kvanto konsistigas 60% de tiu de Ĉinio; konkuloj estas kulturataj sur 2 667 hektaroj kaj ilia jara eksporto-kvanto konsistigas 70% de tiu de la lando; oni gajnis rimarkindan sukceson en scienca kulturado de haliotoj. En 1994 la gubernio produktis 240 000 tunojn da kulturitaj markreskaĵoj kaj fariĝis la unua gubernio de Ĉinio, kiu enspezis el kulturado de markreskaĵoj pli multe ol el fiŝkaptado.

La disvolviĝo de la mara industrio de Shandong-provinco venigis al ĝi 150 000 kamparano-laborantojn el 15 provincoj kaj municipoj. 17 fortaj fiŝkaptaj kompanioj de Weihai aneksis 28 ĉirkaŭajn agrikulturajn vilaĝojn por kune kun ili suriri la vojon disvolvi agrikulturon pere de fiŝkaptado. En la kultivejo de markreskaĵoj de la Xunshan-a Fiŝkapta Kompanio de Rongcheng servas 1 600 laborantoj, 1 460 el kiuj venis el vilaĝoj de Henan, Sichuan, Anhui kaj aliaj provincoj. Mi demandis al geedzoj el Henan-provinco, kial ili venis tien de la malproksima hejmvilaĝo. Ili res-

Skema mapo de lokoj de la regiono



REGIONO ĈIRKAŬ BOHAI-MARO

pondis: “En la hejmvilaĝo ni tre malmulte enspezis el nura terkulturado. Veninte tien, ni ekokupiĝis pri fiŝkulturado kaj ni enspezis pli ol 8 000 juanojn en 1994. Kaj plie, por ni labori en la kultivejo estas pli interese ol en la hejmvilaĝo.”


GRANDA PROFITO EL MARKRESKAĴOJ

La maro ĉe Shandong-provinco, abunda je markreskaĵoj, estas ne nur grava fonto por akiri manĝaĵojn, sed ankaŭ natura trezorejo por preni medikamentajn materialojn.

Nun en la provinco estas malkovritaj 330 specoj da maraj medikamentaj materialoj kaj pli ol 20 entreprenoj produktas marajn medikamentojn. Guan Huashi, profesoro de la Oceanografia Universitato de Qingdao, kaj liaj kolegoj sukcese elfaris la novan medikamenton *Alginati Diesteras* kun algo kiel la ĉefa materialo. Ĝi aparte efikas por preventi kaj kuraci sangomankan malsanon de koraj kaj cerbaj angioj. Multaj farmaciaj fabrikoj produktis serion da sanigiloj kaj manĝaĵoj el ostroj kaj multe profitis de tio. Oni ankaŭ ekstraktis el markreskaĵoj multspecajn industriajn materialojn.

En 1994 la prilabora industrio de marproduktaĵoj de Shandong-provinco faris novan progreson. La 887 prilaboraj entreprenoj de marproduktaĵoj prilaboris 1.17 milionojn da tunoj da marproduktaĵoj kaj starigis rekordon en la historio. La produktovaloro de la sekundara kaj terciara industrioj de la entreprenoj de marproduktaĵoj en la provinco atingis 7.5 miliardojn da juanoj, duoble pli multe ol tiu en 1990.

En la farmacia fabriko Huanghe, kie oni produktas kloran sodon el marsalo



Marsalo estas alia grava marproduktaĵo. En la Delto de la Flava Rivero ĉe la maro de Shandong-provinco etendiĝas salmarĉo kun areo de 1.4 milionoj da hektaroj, t.e., pli ol 50% de la neekspluatita salmarĉo de Ĉinio. En 1994 la provinco produktis 7 milionojn da tunoj da marsalo. La produktovaloro kaj produktokvanto konsistigis 1/4 de tiuj de Ĉinio respektive. Sciencistoj kaj teknikistoj de la provinco la unuaj posedis la teknikon por ekstrakti brominon el salakvo. Ili produktis el bromino fajroestingilon, fajrorezistilon k.a. sume pli ol 40 specojn da salkemiaĵoj. En 1994 la produktokvanto de sodo de la provinco estis 1.08 milionoj da tunoj kaj tiu de kaŭstika sodo — 0.5 miliono da tunoj. Ili okupas la unuan lokon en Ĉinio respektive.

DISVOLVI MARAN INDUSTRION

La areo de la soklo de Shandong-provinco nombras 170 000 kvadratajn kilometrojn, je 13 000 kvadrataj kilometroj pli multe ol la tero de la provinco, sekve Shandong prezentis la strategian sloganon “konstrui du Shandong, la surteran kaj surmaran”. Ĝi disvolvas maran transportadon, oceanan fiŝkaptadon, maran naftoekstraktadon kaj turismon en la ĉemaraj urboj.

Ĉe la marbordo de Shandong-provinco troviĝas 16 havenoj kaj 51 lokoj por konstrui profundakvajn ankrejojn. Post plurjara penado en la provinco funkcias 25 ĉemaraj havenoj kun 177 ankrejoj, kies jara ŝarg-malŝarga kvanto superis 99 milionojn da tunoj. La malfermitaj navigvojoj kondukas al pli ol 300 havenoj de 60 landoj kaj regionoj. Shandong faris relative grandan progreson en fiŝkaptado sur

Post fiŝkaptado



Bredado en maro



Riĉa rikolto de marsalo

Foto de SHEN YING



oceanoj en la pasintaj jaroj. En ĝi funkcias 75 oceanaj fiŝŝipoj kaj 147 ŝipoj por transporti freŝajn kaj vivajn marproduktaĵojn. En 1994 la kvanto de fiŝoj kaptitaj sur oceano atingis 73 000 tunojn. Nun ŝipoj por transporti freŝajn kaj vivajn marproduktaĵojn povas atingi Japanion, Koreion, Hongkongon k.a., fiŝŝipoj povas atingi 6 internaciajn fiŝejojn de Sri-Lankao, Maroko, Rusio, Kamboĝo k.a.

En 1996 la produktokvanto de mara petrolo atingos milionon da tunoj.

Estro de turisma servo de iu ĉemara urbo diris al mi, ke estas trezoroj ne nur la maraj riĉfontoj, sed ankaŭ la verdaj montoj, riveroj kaj freŝa aero en la ĉemaraĵoj. En 1994 la turisma enspezo de

Qingdao, Yantai kaj Weihai konsistigis 80% de tiu de la provinco. La turisma servo de Qingdao okazigis la Festivalon de Biero kaj Festivalon de Sakuro kaj aranĝis diversajn programerojn, kaj per tio altiris al si turistojn el Britio, Germanio, Japanio, Koreio kaj aliaj dekoj da landoj kaj ankaŭ multajn ĉinajn turistojn. En 1994 Qingdao akceptis sume 130 000 alilandajn turistojn kaj 5.6 milionojn da enlandaj turistoj. La disvolvigo de la turisma afero ankaŭ akcelis tiun de la terciara industrio de la provinco. Pli ol 65% de la alilandaj turistoj estis komercistoj, tial la prosperanta turismo havigis al la urbo informojn, talentulojn, kapitalojn kaj komercajn projektojn, kiuj alportis pli grandan socian efikon. ■

REGIONO ĈIRKAŬ BOHAI-MARO



Fiŝkaptado en oceano

Foto de REN WU

Ellaso de konkulidoj en maron



Bredado de haliotoj



EDUKA TELEVIDO EN ĈINIO

Materialo montras, ke en Ĉinio funkcias 7 100 edukaj televid-stacioj kaj relajso-stacioj de televido. Triono de la gubernioj de Ĉinio havas edukan televid-stacion. La tutlanda eduka satelit-televida reto jam havas sian rudimentan skalon.

Nun en Ĉinio pli ol 1.2 milionoj da instruistoj de element- kaj mezlernejoj, kiuj ne ricevis normalan edukadon, televide lernas kursojn por mezgrada kaj altgrada normalaj lernejoj. Pli ol 20 milionoj da kamparanoj televidas la programon pri kamparaj praktikaj teknikoj.

PRI LONGVIVECO EN ĈINIO

La Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio estas unu el la kvar regionoj de la mondo, kie multas longvivuloj. La maljunuloj kun la aĝo de almenaŭ cent jaroj en Hotan, Kashi kaj Aksu konsistigas 73% de tiuj en Xinjiang. Bama-gubernio de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono estas enlistigita kiel la 5-a tiuspeca regiono en la mondo.

Ankaŭ Pengshan de Sichuan estas konata kiel gubernio kun multaj longvivuloj. En 1992 projekciigis la filmo "Pengshan — gubernio kun plej multaj longvivuloj en Ĉinio", kiu estis tradukita en ok lingvojn kaj distribuiĝis en multaj landoj kaj regionoj. Pengshan situas en riĉa loko, kie ĉarmas la pejzaĝo kaj kvietas la medio. La nombro de maljunuloj kun la aĝo de almenaŭ cent jaroj en Pengshan estas 17-oble pli granda ol tiu de aliaj lokoj de la lando.

En Ĉinio la longvivuloj plejparte estas nacimalplimultanoj. La ujuguroj kun la aĝo de almenaŭ cent jaroj en Xinjiang konsistigas pli ol 90% de tiuj de Xinjiang. Bama estas aŭtonoma gubernio de nacimalplimulto kun jaŭ-nacio kiel la ĉefa. Ankaŭ taĝikoj de Xinjiang havas longan vivdaŭron. Ili plejparte vivas sur la Pamira Altebenaĵo pli ol 4 000 m super la marnivelo. Tie kuŝas altaj neĝmon-

toj kaj sterniĝas herbejoj, kun malalta atmosfero, relative stabila humideco kaj malgranda poluado de aero kaj bruoj.

Gong Laifa estas honorita kiel la reĝo de longvivuloj. Li loĝas en profunda monto 850 m super la marnivelo en Tianba-urbeŝo de la Wuchuan-a Gelaŭ- kaj Mjaŭ-nacia Aŭtonoma Gubernio de Guizhou-provinco. Tie vintre ne frostas, somere ne varmegas kaj tutjare regas humideco. Li neniam turnas grandan atenton al vestado kaj manĝado kaj ĉiam kontentas pri sia aktuala vivo.

Por longviveco estas multaj faktoroj, kiaj natura medio, denaska heredeco, familia influo, socia medio kaj psika stato. Ofte okazas, ke longvivuloj loĝas en unu sama regiono. La kvara censo de Ĉinio en 1990 raportis, ke en Wuchuan vivas 1 601 maljunuloj en la aĝo de pli ol 80 jaroj, 27 el kiuj estas pli-ol-90-jaraj, kaj plejparte vivas en profunda montaro.

NOVA ARKEOLOGIA ELTROVO EN DUNHUANG

Lastatempe en Dunhuang, trezorejo de la ĉina kulturo, estis malkovrita ruino de antikva templo, en kiu estas la Groto Yaowang kaj Halo Niangniang. Tio denove vekis intereson de la publiko.

La loka registaro direktis sian grandan atenton al la grava malkovro. Oni trovis en la groto du lignajn tabulojn, freskojn kaj argilajn skulptaĵojn. Fakuloj de la Dunhuang-a Instituto ekspertizis, ke tiuj historiaj objektoj estas altvaloraj, precipe ambaŭ lignaj tabuloj, faritaj en 1818. Ili prezentas la historion pri la plurfoja riparado kaj translokado de la Groto Yaowang. Ili ne nur plenigas la blankon de la historiaj materialoj, sed ankaŭ estas malfacile akireblaj materialoj pri la politiko, kulturo, interŝanĝo inter Ĉinio kaj Okcidento, nacioj, religioj, popolaraj moroj kaj komercado ekzistantaj meze de Qing-dinastio (1644-1911).

ĈARMO EL PLEKTAĴOJ DE TRITIKA PAJLO

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de HAN HONG

EN tiu domo, kies tegmento estis plektita el tritika pajlo, mi sentis nepriskribeblan ĉarmon, kiu tamen originis el la tritika pajlo. Jen la granda pajloĉapelo kun alta pinto kaj larĝa ĉirkaŭrando, kiu elverŝas la karnavalan patoson de Hispanio; la stile krudeca kaj senornama bazarkorbo prezentas la senĝenecon de eŭropanoj; la antikva horloĝo kaj ruĝa kandelo sur muraj pendaĵoj rememorigas, tuj je la ekvido, la teneran scenon de la familianoj sub la kandela lumo, kiuj sidas ĉirkaŭ la forno kaj maldormas la jarfinan nokton; kaj tiuj pupoj, naivaj kaj stultaj, kun arkaj brovoj kaj okuloj sur la ridema vizaĝo vekas la infanecon en la koro de la rigardantoj, kiuj ridetas antaŭ la pupoj eĉ malgraŭ sia humoro neserena. Ĉiu verko estas plena de spriteco, kaj la delikata aromo de pajlo elvokivas la kampon kaj incitas sopiron al la grundo...

Jen la pajloplektaĵoj de Daming, kies beleco skuas la rigardantojn.

La antikva gubernia urbeto Daming situas sudoriente de Handan de Ĉinio, ĉe la origina vojo de la Flava Rivero, riĉa je tritiko kaj maizo.

De longe la Daming-anoj vivas neriĉan vivon. Ili preparas diversajn farunaĵojn el tritiko kaj maizo kaj plektas el tritika pajlo kaj maiza ŝelo ĉapelojn por sin ŝirmi kontraŭ vento kaj pluvo, sandalojn kontraŭ frosto, matracojn kontraŭ humideco, por-dokurtenojn kontraŭ muŝoj kaj skatolojn por kudri-
loj kaj fadenoj... La superflujajn pajloplektaĵojn ili vendas en bazaro.

La materialoj de pajloplektaĵoj venas de la kampo. Rikoltinte tritikon, oni senfoliigas la pajlon per kvinforke, disgrajnigas ĝin kaj elektas la maldikajn kaj longajn tigojn.

Sekaj tigoj estas rompiĝemaj. Necesas rui ilin antaŭ ol uzi. Spertuloj diras, ke la tigoj ruitaj en riztralava akvo estas elastaj kaj briletaj kaj plej taŭgas por uzado.

Pretiĝas la tritikaj tigoj kaj komenciĝas farado de pajloplektaĵo. Tio estas eksperta metio de la Daming-aj virinoj, kiuj tion eklernas en la aĝo de 3-4 jaroj. En la frosta vintro virinoj sidas sur varma terlito kaj faras pajloplektaĵon. Ili ĝoje babilas sen interrompi la laboron.

Post kiam ekfunkciis la prilaborejo de pajloplektaĵoj en la gubernio, strata aĉetado de pajloplektaĵoj fariĝis speciala okupo. La ofertantoj nature estas tiuj dommastrinoj, kiuj bone konas la kurzon kaj lertas en marĉandado. Se ili ne konsentas la aĉet-proponon de klientoj kaj ne urĝe bezonas monon, ili do hejmeniros kun siaj pajloplektaĵoj...

Enfermitaj en la vilaĝoj, la pajloplektaĵoj de Daming similis al tiuj kamparanaj virinoj, esence modestaj kaj tute senfamaj. Tamen tio estis nur pasintaĵo.


Sensacie efektas kelke da pajloplektitaj vestoj. Ili eble aŭguras la morgaŭan pompecon de Daming-aj pajloplektaĵoj, sed ne rekomendas al nuntempuloj sin vesti samfasone. Ne, ili ne havas praktikan valoron. Tamen, kun senkompara fajneco kaj pionira originaleco ili manifestas, sur pli alta nivelo de arto, la bravan kreivon kaj distingigan talenton de la farinto. Li ne povus plenumi tiun projekton, se li ne havus tute novan koncepton kaj modernan konscion. La farinto estas neniu alia ol la honesta mezaĝulo Li Daming, kiu kreskis ĉe la origina vojo de la Flava Rivero.

Li Daming diris al mi, ke de la infanaĝo li ŝatas pajloplektadon. Diplomiĝinte el malsupera mezlernejo, li fariĝis laboristo kaj poste lernis projektadon. La politiko de reformado kaj pordomalfermo havigis al li la bonŝancon sin disvolvi. La sinperfektigo en la Belarta Fakultato de Handan-universitato kaj la esplorado pri ekzotikaj folkloroj en Usono, Francio, Svislando, Saudi-Arabio kaj Japanio larĝigis al li la artisman vidkampon. Rezulte de tio, liaj pajloplektaĵoj figuris la Kristnaskan Avon kaj aron da gnomoj ornamantaj la kristarbon kaj vidigis la ekranon kun broditaj bonaŭguraj floroj kaj birdoj de la ĉina popola tradicio, kompreneble, ankaŭ furorantajn kolorojn; la tradicia unuforma skatolo nun transformiĝis en la pinttegmentan dometon en fabelo; kaj dekoraciaj desegnoj fariĝis pensigaj "fabloj".

Panjo Kokino, larĝe malferminte la bekon, babileme kaj senlace instruas siajn gefilojn, el kiuj unu energie senkulpigas sin kaj la alia profunde dormas — ho, la patrineco kompatinda! Tiun karikaturan bildon projektis Li Daming sur bazarkorbo, skizante nur la kapojn kun la troigitaj bekoj.



Manekenoj en pajloplektitaj vestoj



Pajloplektita ekrano

Ekran kun pajloplektitaj floroj kaj birdoj






Pajloplektado


La nacia estetiko harmonias kun la ekzotika gusto, la tradicia metodo kunfandiĝas kun la moderna percepto kaj diversaspecaj art-esprimivoj interfluas reference. Ĉio ĉi novigas liajn pajloplektaĵojn en speco, koloro, plastiko kaj strukturo. Ĉiujare, pli ol miliono da pajloplektaĵoj de mil specoj vendiĝas en Okcidenta Eŭropo, Norda Ameriko kaj Sudorienta Azio.

Iuj timas, ke kun urbanizo de la ĉina kamparo, la pajloplekta arto de kamparanoj pli aŭ malpli frue perdiĝos. Mi pensas, ke eble ne. Jes, la Daming-anoj ne portas plu pajlosandalojn, sed ili ankoraŭ plektadas. Multaj modernaj familioj havas sur la tabloj etajn pajlosandalojn plenajn de sovaĝaj floroj kaj aromaj herboj. La urbanoj forte aspiras la naturon, soifante la originan simplecon. ■

"Kristnaska Avo"



Pendaĵoj el tritika pajlo



Kreinto de pigra kotono

EN la ĉina provinco Shanxi estas kotonkulturisto Cao Shengji, kiu famas pro sia "pigreco". Li kulturas kotonon tute kontraŭ la kutima maniero. Li ne stucis, ne debranĉigis, nek skarifikis. Li semis malfrue kaj dissemis la semojn en grandaj sulkoj. En samarea kampo la sumo de liaj plantidoj estas malpli ol duono de tiu sur alies kampo. Mirinda estas tio, ke la produktokvanto de lia kotonkampo estas duoble pli granda ol la meznombra produktokvanto de la tuta lando. Lia simpligita koton-kultura tekniko estas ameme nomata de kotonkulturistoj tiu de pigra kotono.

En 1994, hajlo senĉese atakis la antaŭurbon de Pekino, sekegeco kaj inundo frekventis la provincojn Anhui, Shandong kaj Hebei, kotonkapsulvermoj aperis amase. Sed en tiuj lokoj la pohektara produktokvanto de kotono estis pli granda je pli ol 150 kilogramoj ol tiu de aliaj lokoj, kiuj suferis de sama katastrofo. Tiujare la produktokvanto de kotono de 67 000 hektaroj da kampoj en 13 provincoj kaj municipoj de la tuta lando estis je 20% pli granda ol tiu de aliaj kampoj. La sekreto de ĉio ĉi estas, ke ili kulturis pigran kotonon kreitan de Cao Shengji.

Cao Shengji sin okupis je kotonkulturado ekde 1976. Tiam senescepte aplikigis tradicia maniero de kotonkulturado. Dum la tuta kreskado de kotono, oni devis skarifikati 7-8-foje, stuci 4-5-foje kaj senĉese batali kontraŭ kapsulvermoj per disŝprucigado de insekticido kaj kaptado. Pro tio oni elspezis pli kaj pli multe. La produktokosto fariĝis

pli kaj pli alta. Kiamaniere ŝanĝi tiun ĉi staton, por ke oni metu malpli da laborforto, reduktu la koston kaj rikoltu pli da kotono? Cao Shengji sin turnis al scienco. Li studis amason da fakaj libroj en kaj eksterlandaj kaj komencis provon sur sia kampo laŭ la supozo elmetita de agronomoj por simpligi la kotonan kulturadon.

Jaroj pasis unu post alia. Cao Shengji iom post iom formis kompletan da projekto pri simpligo de kotonkulturado. En 1983, laŭ kontrakto li kulturis 2 hektarojn da forlasitaj kampoj, kredite ricevis 5 000 juanojn kaj komencis praktike labori laŭ sia projekto. Eble tiam li ne sufiĉe konsideris pri la produkta medio, eble lia nova tekniko ankoraŭ ne maturiĝis, la nove plugita kampo donis tre malmulte da kotono. Vendinte la kotonon, li ricevis sume 250 juanojn. En la plej malfacila tempo lia edzino donis al li plenan konfidon kaj fortan subtenon kaj fariĝis lia bona helpanto en la provado.

Pasis pliaj du jaroj. Maturiĝis lia tekniko. Aŭtune ĉiu planto en lia kampo aspektis kiel pagodo. Sur ĉiu hektaro da kampo kreskis ĉirkaŭ miliono kaj 50 mil kotonkapsuloj, kiuj donis 2 100 kilogramojn da kotono. Sukcesis la provado de pigra kotono. Lia sekva laboro estis plivastigi la plantareon kaj konigi sian teknikon al pli multaj kotonkulturistoj.

Ne kutimas ankaŭ lia metodo de plivastigado de la nova tekniko.

En 1986, 7 samvilaĝaj kotonkulturistoj, kiuj propraokule vidis la rikolton de lia pigra kotono, petis lin instrui al ili la metodon. En la sekva jaro kotonkulturistoj de 3

vilaĝoj petis lin instrui. En tiuj du jaroj sur 26 hektaroj kreskis pigra kotono. Ĉiu hektaro produktis ĉirkaŭ 1 500 kilogramojn da kotono, je 71.5% pli multe ol tiu per la kutima metodo. Plia sukceso naskis novan ideon en la kapo de Cao Shengji. Li publikigis reklamon en ĵurnalo. Li reklamis, ke li instruas koton-kulturan metodon, kiu postulas nek skarifikadon nek stucadon, bezonas insekticidon modere kaj donas pohektare sensemigitan kotonon je pli ol 1 500 kilogramoj. Se la lerninto ne gajnos lian promesitan rikolton, li do respondecos pri kompenso. Kontraŭ tiu riska kontrakto li postulas nur 15 juanojn kiel servpagon por ĉiu hektaro.

Kampanoj kredas fakton. Leginte lian reklamon, kotonkulturistoj el 9 gubernioj subskribis kun li kontrakton pri kotonplantado sur 134 hektaroj da kampoj en la sekva jaro.

Laŭ la kontrakto oni kulturis la kotonon sur 15 terpecoj, dislokitaj en spaco de pli ol 500 kilometroj. Estis vere malfacile instrui la metodon al tiuj kampanoj antaŭ la printempa semado. Kun firma volo li komencis la penigan laborvojaĝon. Kunportante memfaritajn specimenojn kaj grafikaĵojn, li ĉiutage biciklis 80-90 kilometrojn de vilaĝo al vilaĝo, malgraŭ ventego kaj neĝado.

Per sia peniga laborado Cao Shengji gajnis riĉan rikolton de pigra kotono kaj la kampanoj estis tute konvinkitaj.

En tiuj jaroj, kiam Cao Shengji diligente plivastigis sian teknikon, furiozis en kotonproduktejoj la plago de kotonkapsulvermoj. Tial en lia kontrakto aldoniĝis artikolo, ke la kosto de insekticido por ĉiu hektaro ne superu 450 juanojn kaj por ekstermi kotonkapsulvermojn de la 2-a kaj 3-a generacioj, li postulos pagon nur post sukceso de la laboro, alie li do kompensos la perdon.

Kvankam lia tekniko de kotonkulturado ebligas sukcesan jungon de kotonkapsulvermoj, tamen la laboro estas tre malfacila. Por garanti tii realigon de la kontrakto, Cao

Shengji severe trejnus pli ol 30 koton-kulturistojn, kiuj aplikas lian teknikon. Poste tiuj trejnitaj kamparanoj disiris al la kontraktitaj lokoj. Ili unuflanke instruis la teknikon, aliflanke observis kaj regis la kreskon de vermoj de la 1-a generacio. Laŭ malsama drogrezisteco de la vermoj, Cao Shengji faris malsamajn insekticidojn kaj en la favora tempo sukcese mortigis kotonkapsulvermojn de la 2-a kaj 3-a generacioj.

Estas ŝpara kaj facila la tekniko

de la kotona kulturado, tamen ĉu bonkvalita estas la kotono? Kotona Esplora Instituto sub la Ĉina Agronomia Akademio faris specialan ekspertizon. La rezulto montris, ke pigra kotono atingis aŭ superis ĉiujn ekzamenajn normojn de bonkvalita kotono difinitajn de la ŝtato.

En 1993, en Ĉinio la meznombra pohektara produktokvanto de sensemigita kotono estis nur iom pli ol 750 kilogramoj, tamen tiu de pigra kotono estis preskaŭ duobla.

De la lastaj jaroj pro damaĝo de kotonkapsulvermoj, grandaree reduktiĝis la produktokvanto de kotono. Sole en 1992 la perdo superis 10 miliardojn da juanoj. Nun faktoj pruvis, ke sukcesis Cao Shengji en jungado de kotonkapsulvermoj. En 1989, koton-kulturistoj de pli ol 200 gubernioj de 11 provincoj subskribis kun Cao Shengji teknikservan kontrakton kaj la kulturareo de pigra kotono atingis 1 870 hektarojn. En 1992, la kulturareo atingis 47 000 hektarojn kaj en 1994, ĝi superis 66 670 hektarojn. ■

45-JARA JUBILEO DE "EL POPOLA ĈINIO"

VARMAJ GRATULOJ

En la nomo de Hungaria Esperanto-Asocio kore ni gratulas vin okaze de via 45-a jubileo.

Dum la pasintaj jardekoj jam generacioj edukiĝis pri Ĉinio pere de via revuo. Ni hungaroj multon eksciis pri via lando, eĉ ni povis legi pri tiuj aferoj, pri kiuj nenie aliloke.

Ni deziras al vi pluan sukceson en la eldonado de via internacie rekonata revuo.

Oszkár Princz, sekretario de Hungaria Esperanto-Asocio

Okaze de via 45-a datreveno ni elkore gratulas vin kaj bondeziras multegajn aliajn jarojn fruktodonajn kaj sukcesajn.

Valerio Dalla, prezidanto de Itala Esperanto-Federacio

Okaze de la 45-a datreveno de la fondiĝo de via ŝatata revuo "El Popola Ĉinio" permesu al ni esprimi elkoran gratulon al vi kaj deziri, ke ĝi prosperu ankoraŭ pli kaj pli kaj liveradu al ni multifacetajn artikolojn kun bunte bela ornamo pri la progreso de via lando, pri la popola vivo kaj pri via kulturo tradicia kaj moderna.

Ni estas des pli kortuŝitaj pro la koincido, ke mi meografita modesta gazeto "Osaka Esperantisto", antaŭiranto de nia nuna organo "La Movado", estis lanĉita ĝuste en la sama monato de la sama jaro. Kaj ni ne povas ne rememori nian bedaŭratan gvidanton Miyamoto Masao, kiu jam de la komenco penadis distribui vian revuon riskante arestiĝon pro tiu ago tiam kontraŭleĝa.

**Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj
Nakamiti Tamihiro (ĉefkomitatano)
[Anstataŭis Sakamoto Syozi
(ĝenerala sekretario)]**

Kun granda ĝojo mi konstatas, ke la nuna jaro estas por "El Popola Ĉinio" jubilea — ĝi ja festas sian 45-jariĝon. Iomete tio nin eĉ surprizas — ĝi jam tiel enradikiĝis en la movadon kaj fariĝis regula monata Esperanto-menuo por multaj legantoj, ke oni eĉ forgesis kalkuli ĝian aĝon.

La ĉeĥa esperantistaro havis ĉiam tre bonan rilaton al la revuo. La luksa vizaĝo kaj bunta enhavo dum multaj jaroj alproksimigadis nin al via lando, por ni, mezeŭropanoj, iom kurioza kaj ekzotika pro riĉa historio, pro alta kulturo, pro malordinara vivmaniero, pro alloga naturo.

En la nomo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio mi deziras al vi daŭran entuziasmon, laboreman kunlaborantaron kaj fidelan legantaron!

Vlastimil Kočvara, prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Estis mia dankinda feliĉo, ke EPCĈ vastanime akceptis min, kiu estis nur izolita komencanto de nia lingvo, kiel nova leganto antaŭ ĉirkaŭ 30 jaroj. De tiam EPCĈ fariĝis al mi neanstataŭigebla lernilo por mia studado de ne nur la lingvo. En 1983, malgraŭ mia povra kapablo, mi kuraĝe jesis fariĝi peranto de nia revuo, kiel anstataŭanto de la eminenta antaŭulo.

Ĉe la sojlo de nova stepo de 46-jara eldono de nia revuo, mi elkore deziras plej fruktoriĉan rikolton eĉ ekde nun kaj plej feliĉan kaj pacan prosperon de ĉiuj karaj EPCĈ-amantoj.

MORI Singo, peranto de EPCĈ el Japanio

Mi volas gratuli vin okaze de la 45-jaraĝo de via tre interesa kaj bele ilustrita revuo, kiu en la lastaj jaroj fariĝis tre bunta.

Gwenda Sutton (Nov-Zelando)

(Pro manko de spaco ni aperigis supraĵajn gratulajn leterojn post mallongigo. Ni pardonpetas pro tio. — La Red.)



La Templo de Sima Qian

FAMAJ URBOJ

HANCHENG, "MUZEO DE ANTIKVA ARKITEKTURO"

Fotoj de WANG XINMIN


Arkado en strato



Hancheng estas antikva urbo apud la Flava Rivero en Shaanxi-provinco sur la Leŭsa Altebenaĵo. Tie estas multaj antikvaj konstruaĵoj, kiel loĝdomoj kaj temploj.

En la urbo estas la Templo de Sima Qian konstruita en la jaro 310. Plurfojaj riparadoj kaj plivastigoj faris la templon pli impona. En la templo estas dormohalo, kulta halo, portalo kaj kvar arkadoj.

La Konfucea Templo situas sudoriente en la urbo. Ĝi estis rekonstruita en 1371 sur la malnova bazo de la templo konstruita en Yuan-dinastio (1206-1368). Ĝi estas impona ensemblo karakterizita per la konstrua stilo de la dinastioj Yuan kaj Ming (1368-1644). La glazuritaj ornamaĵoj sur la tegmentoj de la domoj karakterizas la originalan stilon de la antikvaj konstruaĵoj de Ĉinio.




Glazurita ornamaĵo sur tegmento

Pordo de loĝejo kun kvadrata korto




Loĝdomoj en la vilaĝo Dangjia



En la templo konserviĝas granda nombro da valoraj antikvaĵoj.

En Hancheng estas multaj nedifektitaj loĝdomoj, kaj multaj el ili estas kvadrataj en la stilo de la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911). Sole en la vilaĝo Dangjia estas 114 tiaj domoj. Tia domo konsistas el oblonga brika korto ĉirkaŭita de vicoj da ĉambroj ĉefaj, flankaj kaj pordistaj. En la vilaĝo estas fuorto, scenejo, prapatra templo kaj arkado, tipaj konstruaĵoj en miksita stilo de urbaj kaj kamparaj konstruaĵoj. Iu brita arkitekto diris post sia vizitado en la urbo: "La orienta arkitekturo troviĝas en Ĉinio, kaj la arkitekturo de ĉinaj loĝdomoj troviĝas en Hancheng."



En la Baoshan-a Ŝtala Kompanio

XU SENRONG:

16 jaroj de la Baoshan-a Ŝtala Kompanio

16 jarojn antaŭe, la ĉina registaro decidis starigi grandegan ŝtalan entreprenon en mia hejmloko Baoshan-distrikto en antaŭurbo de Ŝanhajo. Neatendite, tio vekis disputadon. Iuj opiniis, ke Ĉinio ne kapablas por tio. Estas neforgeseble, ke kiam oni jam investis 10 miliardojn da juanoj por la konstruado, la disputado ankoraŭ daŭris. Pro tio kaj ankaŭ pro financa problemo la registaro decidis portempe prokrasti la konstruadon.

16 jaroj pasis. Kiel statas la Baoshan-a Ŝtala Kompanio? Reveninte la hejmlokon, mi havis la ŝancon viziti tiun modernan ŝtalan entreprenon, kies imponeco forte mirigis min. La fakto pruvis ĝusta la decidon de la ĉina registaro.

MIRAKLO

En 1978 oni enbatis la unuan ŝtalan foston sur aluvio ĉe la enfluejo de Yangzi-rivero. Tio signifis, ke la konstruantoj devas unue solvi grandan malfacilon en scienco kaj tekniko por konstrui gigantan

ŝtalan entreprenon sur mola tertavolo. Fakte, sur la tero kun totala areo de 13.7 kvadrataj kilometroj oni enbatis pli ol 200 000 tunojn da ŝtalaj fostoĵoj, 39 000 betonajn fostoĵojn kaj 401 000 kubmetrojn da sablo.

La projekto kaj instalaĵoj de la unuaperioda konstruado de la kompanio estis importitaj. Tio estis granda risko antaŭ 16 jaroj, kiam Ĉinio fundamente izolis sin de la mondo. La konstruantoj tamen opiniis, ke importi avangardajn teknikojn kaj spertojn helpas al Ĉinio plej rapide proksimiĝi al la nivelo de la mondo. Ili kontaktiĝis telefone kun alilandanoj pri komerco de ŝtalo unufoje preskaŭ 30 jarojn post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, kaj per tio ili finis sian multjaran izolitecon.

En 1.5 jaroj ili pli-ol-13 000-foje traktadis kun alilandaj entreprenistoj. Dank' al tio, ili akiris plej bonan specon de ŝtalo, plej favoran prezon kaj avangardan teknikon de miloj da fabrikoj de dekelkaj landoj. Ili importis kompletan modernan kombinaĵon kun unuaranga nivelo de la mondo. La 15-an de septembro 1985 la kompanio estis finkonstruita.

Dank' al tio, la distanco de ŝtala industrio inter Ĉinio kaj la mondo estis mallongigita je 20 jaroj.

PROFITI DE ALILANDAJ TEKNIKOJ

Laŭ la kompanioj importado ne estas celo, sed renovigo estas plej grava. En la 16 jaroj la kompanio persistis en la principo importi — asimili — disvolvi — renovigi. Ili rapide ellernis alilandajn avangardajn teknikojn kaj senĉese plimultigis instalaĵojn faritajn de Ĉinio. En la unuaperioda konstruado la ĉinaj instalaĵoj konsistigis 12% kaj en la duaperioda tiuj por muldado, varma kaj malvarma laminatadoj — 44% kaj tiuj por aglomerado, ferfandado kaj koaksigado — 88%. En la duaperioda konstruado oni aplikis ankaŭ multajn novajn teknologiojn kreitajn de Ĉinio mem, kiel ekz., reprenadon de restanta gaso-varmo, ultramalalta-karbonan fandadon k.a.

Samtempe kun tio, la kompanio dungis nombron da alilandaj fakuloj. Eĉ ili foje ne sciis kion fari kun avangardaj ekipaĵoj. En 1990 paneis la 5 importitaj mueliloj de la fabriko de malvarma laminatado, kiu ĵus komencis sian provproduktadon. Pro tio la usona ŝtala kompanio, kiel la ĉefa kontraktanto, 8-foje venigis koncernajn fakulojn. Ili reguligis la muelilojn dum 2 jaroj, sed vane. S-ro Wang Yuhua, komputora inĝeniero de la kompanio, decidis mem solvi tiun problemon. Konsultinte multajn materialojn kaj farinte observadon ĉeloke, li trovis la kaŭzon de la paneo. Usonaj fakuloj alte taksis tiun ordinaran ĉinon, asertante, ke la kompanio certe havos sian spertan reguliganton. 7 monatojn poste, la 5 mueliloj funkciis ne nur laŭ la origina projekto, sed ankaŭ kun aŭtomateco kreita de Wang Yuhua.

Dank' al nombro da elstaraj fakuloj, kia Wang Yuhua, la kompanio povis venki malfacilojn unu post alia kaj akiris bonajn sukcesojn.

AL INTERNACIA NORMO

Per 30 miliardoj da juanoj investitaj de la ŝtato oni finkonstruis la kompanion. Por la kompanioj tiu monsumo estis granda premo. Ili opiniis, ke se la produktaĵoj ne estus unuarangaj, tio montrus nur ilian nekapablecon. Tial, de la komenco de la produktado ili celis internacian normon.

Bone sciante, ke Japanio, kiu posedas la plej altan nivelon de malvarma laminatado en la mondo, estas la plej elektema je produktaĵoj, la kompanio tamen eksportis siajn produktaĵojn al ĝi. Ili opiniis, ke oni povos akiri la "paspermeson" al la internacia merkato, kiam iliaj produktaĵoj estos ŝatataj en Japanio. Nun la produktaĵoj de la kompanio eksportiĝas ne nur al Japanio, sed ankaŭ al Koreio, Usono kaj aliaj 21 landoj kaj regionoj, inkluzive de tiuj en Sudorienta Azio, je pli ol 300 000 tunoj ĉiujare.

Antaŭe en la okuloj de alilandanoj, Ĉinio bezonis importi ŝtalon por fari aŭtajn ŝelojn, ĉar la ŝtalo produktita de Ĉinio taŭgis nur por fari ĉasiojn kaj

similajn. Post 9-monata penado la kompanio sukcesis elfari ŝelon de la aŭto kun marko Santana el sia malvarme laminatita ŝtalplato. Ili produktis pli ol 100 specojn da unuaranga ŝtalo por aŭtoj, ŝipoj, elektronikaj aparatoj kaj moneroj.


GRANDA PLANO

En la zono, kie situas la kompanio, verdas arboj kaj prosperas floroj. La kompanio distancas de la urbocentro de Ŝanhajo je 30 km. Antaŭe iuj timis, ke fulgeroj kaj sulfura dioksido eligitaj el la ŝtala fabriko falos en la kvartalojn dense loĝataj. Pro tio, ĝi importis avangardajn medioprotektajn teknikojn kaj instalaĵojn por efike regi la eligadon de fulgeroj kaj aliaj malutilaj substancoj kaj gasoj, ke ĉi tiuj ne superu la normon difinitan de la ŝtato. Nun, la zono de la kompanio estas pura kaj la makulaj ĉervoj bredataj de ĝi jam havas siajn idojn.

En la 16 jaroj la kompanio senĉese disvolviĝis kiel ĝia jara ŝtala produktokvanto atingis 6.7 milionojn da tunoj, sed ĝi reduktis la nombron de siaj laboristoj de 40 000 al 19 500. Pro tio la pokapa ŝtala produktokvanto atingis 618 tunojn, sepoble de tiu de la aliaj ŝtalaj entreprenoj de Ĉinio.

La kompanio funkcias laŭ tute nova organismo. Neniam kontentigante pri siaj sukcesoj, ĝi ellaboris grandan planon. Ĉe la fino de la kuranta jarcento, kiam finiĝos la triaperioda konstruado, ĝi povos produkti jare 12 milionojn da tunoj da kruda ŝtalo kaj 10 milionojn da tunoj da ŝtalaĵoj, havos 20 filiojn eksterlande, finkonstruos la Ningbo-an Ŝtalan Fabrikon kun tute nova laborproceso kaj avangarda nivelo de la mondo kaj la Zhanjiang-an Ŝtalan Fabrikon siaspecan kaj starigos entreprenojn pri inĝenierio, instalaĵo, komerco kaj financo. Tiam la kompanio enviciĝos inter la plej grandaj entreprenogrupoj de la mondo. ■

En la laborejo de senjuntaj ŝtaltuboj de la kompanio





Por rememorigo



En la hejmo de ordinara pekinano

Kiel interesa pordornamaĵo!

Ekskurso en stratetoj de Pekino

Fotoj de LIU SIGONG

“Iru rigardi en stratetoj”, jen turisma programo proponita las-tatempe en Pekino. La ekskurso altiris nemalmultajn fremdlandajn turistojn.

La partoprenantoj portas sur sia brusto rondan ordenon kun la vorto “Iru rigardi en stratetoj” kaj veturas per tricikloj. La tricikloj havas tegmenton el ruĝa ŝtofo, tute en pekina stilo. La triciklistoj estas fortaj junuloj en flava veŝto, pantalono kun larĝaj tuboj, nigra pelta ĉapelo, nigraj tolaj ŝuoj.

La tricikloj malrapide iras de strateto al strateto, kaj la turistoj povas pririgardi domojn, portalojn kaj ornamaĵojn, butikumi aŭ viziti ĉinan familion. Ili povas piediri kaj pririgardi loĝejon kun kvadrata korto. Ili povas ankaŭ prepari manĝaĵojn kune kun la mastro.

Poste la tricikloj portas la turistojn al la Tambura Turo, kiu sidas sur la meza akso de Pekino. Sur la alta turo ili povas havi belan panoraman vidon al Pekino.

Statistiko raportas, ke krom larĝaj ŝoseoj kaj ĉefaj stratoj, en Pekino ankaŭ rete interkruĉiĝas

miloj da stratetoj, en kiuj loĝas duono de la loĝantaro de Pekino. En la stratetoj oni povas ĝui la antikvan kulturon de Pekino kaj sperti la etoson de la moderna vivo. Nun la programo vekas pli kaj pli grandan intereson ĉe fremdlandanoj.




En strateto



Turistoj veturantaj per tricikloj

De surlignaj signoj al moderna edukado

de GUO MIN



Nacimalplimulta studentino akceptas doktoriĝan diplomon.

EN la okuloj de la modernaj homoj notado per signoj ĉizitaj sur ligno kaj ŝnurnodado kaj nombrado per fajoj estis farataj nur en pratempo, tamen en la fino de la 40-aj jaroj de la nuna jarcento, kiam naskiĝis la nova Ĉinio, tiaj fenomenoj daŭre vidiĝis en la landlimaj nacimalplimultaj regionoj de Ĉinio. Ĉu mirige? Ne. Se vi pli bone konas la ĉinan socion, vi trovos, ke tio estas nepra sekvo de la historia evoluo. Ĉar en la longa historio de la malnova Ĉinio, katenite de la socia ekonomio, la tiea nacia edukado estis tre postĝinta.

Antaŭ 1949 en la regionoj de la ĉinaj nacimalplimultoj la eduka-

do estis ĝenerale tiaspeca: Edukado en la stilo de primitiva socio, tiu de sklava socio, la templa edukado en la stilo de feŭda socio kaj moderna edukado. Tiam en nia tuta lando troviĝis neniu normala alta lernejo sole por nacimalplimultoj. En multaj regionoj de nacimalplimultoj estis nur kelkaj elementaj lernejoj aŭ mezlernejoj. En iuj lokoj la analfabetoj konsistigis eĉ pli ol 95% de la tuta loĝantaro.

Por radikale ŝanĝi la fenomenon, ekde la 50-aj jaroj la ĉina registaro donis grandan atenton al edukado de nacimalplimultoj kaj praktikis aparte favorajn politikojn..

En edukaj administracioj de la

centra registaro kaj lokaj registaroj de diversaj niveloj estas apartaj fakoj aŭ personoj respondecaj pri edukado de nacimalplimultoj.

Jam en la unuaj jaroj post la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, kiam la nacia ekonomio estis en malfacila stato, la centra registaro asignis, krom la normala elspezo por edukado, ankaŭ apartan monsumon por nacimalplimulta edukado, kiu grandiĝis jaro post jaro. En 1979 la sumo atingis 71 milionojn da juanoj. Ekde 1980 tiu sumo estis uzata de la provincoj kaj aŭtonomaj regionoj laŭ kontrakto. Iuj lokoj ankaŭ asignas monsumojn el sia propra kapitalo por la nacia edukado. Ekde 1983 la Guangxi-a Ĝuang-

nacia Aŭtonoma Regiono ĉiujare elspezas 11 milionojn da juanoj por konstrui kaj ripari domojn de elementaj lernejoj en la nacimalplimultaj kaj malriĉaj regionoj, krom la 11 milionoj da juanoj ĉiujare elspezitaj de la ŝtato. De 1990 la ŝtato ĉiujare asignas 20 milionojn da juanoj por disvolvi la nacimalplimultan edukadon. Ĉio ĉi tio finance garantias edukadon en la nacimalplimultan regionoj.

Koncerne akcepton de novaj studentoj far nacimalplimultaj lernejoj kaj laborpostenigon de la

tojn kaj universitaton. Estas ankaŭ iuj mezlernejoj kaj altaj lernejoj, kiuj funkciigas nacimalplimultajn kursojn. Laŭ nekompleta statistiko en la tuta Ĉinio nun estas pli ol 5 000 elementaj kaj mezgradaj lernejoj de nacimalplimultoj, kie lernas pli ol miliono da lernantoj, kaj krome estas ankaŭ unu universitato kaj 12 institutoj de nacimalplimultoj.

Laŭ difino de la Ŝtata Eduka Komisiono la diversnivelaj nacimalplimultaj lernejoj rajtas elabori sian propran instruon planon



En lernejo de Xinjiang

nacimalplimultaj diplomitoj la ŝtato praktikas favoran politikon, t.e. doni privilegion al la nacimalplimultanoj. En la lastaj jaroj la registaro alprenis novan metodon, ke la lernejoj akceptas lernantojn en difinitaj lokoj kaj sendas la diplomitojn al difinitaj lokoj aŭ laborpostenoj, por kontentigi la bezonon de la nacimalplimultaj regionoj.

Por adaptiĝi al la trajtoj de la ĉinaj nacimalplimultoj kaj lokoj loĝataj de ili, Ĉinio alprenis diversajn metodojn por funkciigi lernejon, starigis nacimalplimultajn elementajn lernejojn, mezlernejojn, normalajn lernejojn, institu-

kaj programon kaj fari konvenan modifon kaj aldonon surbaze de la praktikaj kondiĉoj de la nacioj. En iuj nacimalplimultaj lernejoj funkcias du-lingva instruado, t.e. oni lernas kaj la propran nacian lingvon kaj han-lingvon. En la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono vivas 46 nacimalplimultoj kaj estas entute 7 088 elementaj lernejoj kaj 1 851 mezlernejoj. 71.8% de la elementaj lernejoj kaj 51.38% de la mezlernejoj uzas nacimalplimultajn lingvojn en instruado. Por kovri la finanĉan deficiton en eldonado de lernolibroj en nacimalplimultaj lingvoj la registaro de la aŭtonoma regiono ĉiujare elspezas 6 milionojn da ju-

anoj.

Nun en Ĉinio 16 000 elementaj kaj mezgradaj lernejoj de 24 nacimalplimultoj instruas samtempe han-lingvon kaj nacimalplimultajn lingvojn. Oni eldonis 1 600 lernolibrojn en 21 nacimalplimultaj lingvoj kun 170 milionoj da ekzempleroj.

Disvolvante la nacian edukadon, la ŝtato donas grandan atenton al kulturado de la nacimalplimultaj instruistoj, tial ĝi fondis nacimalplimultajn normalajn lernejojn en iuj lokoj kaj funkciigas nacimalplimultajn kursojn en iuj instruistaj lernejoj kaj kursojn por trejni la nacimalplimultajn instruistojn.

En la landinternaj lokoj oni akiris rimarkindajn sukcesojn en la laboro por helpi nacimalplimultan edukadon. De 1982 ĝis nun 70 landinternaj altaj lernejoj faris kunlaboron kun la lernejoj de Xinjiang, Interna Mongolio, Ningxia, Guizhou kaj aliaj lokoj. De 1985 Ĉinio funkciigas tibetan kurson en kelkaj bonkvalitaj mezlernejoj kaj tibetanan mezlernejon en Pekino kaj Chengdu. Nun en 67 mezlernejoj de 25 provincoj kaj municipoj estas tibetana kurso, kie lernas entute 9 000 lernantoj. 6 600 instruistoj el multaj provincoj kaj municipoj laboras en Tibeto.

Dank' al 40-jara senĉesa laborado, multe progresis la nacimalplimulta edukado en Ĉinio. En la unua duonjaro de 1994 en ĉiuj naciaj aŭtonomaj regionoj, subprovincoj kaj gubernioj funkcias entute 98 000 elementaj lernejoj kun 18.44 milionoj da lernantoj, kiuj konsistigis 97% de la lerno- aĝaj geknaboj, 12 000 mezlernejoj kun 6 milionoj da lernantoj. En la tuta lando la nombro de nacimalplimultaj studentoj atingis 163 000 en 1993, je 76.1 obloj pli multe ol tiu en 1951.

Nun la ĉinaj nacimalplimultoj havas ne nur siajn proprajn elementajn kaj mezgradajn fakajn laborantojn, sed ankaŭ siajn proprajn magistrojn kaj doktorojn. ■

CHI LI:

Homo kaj lupoj sur dezerto* (Novelo)

KVIETECO regis sur la dezerto Taklimakan. Milde radiis la suno en la tria horo posttagmeze. La fluliniaj sablomontetoj karesataj de zefiro trankvile kuŝis en la sunradioj. En tiu agrabla posttagmezo, profunde de la dezerto Taklimakan, ne haltis aŭtokaravano. Naŭ kamionoj preterveturis Jiang An unu post alia. Gaje fajfante, Jiang An rampis sub sian kamionon por iom ripari ĝin.

Jiang An ĝuis renomon pro sia lerta fajfado, rakontado kaj pafado. En gaja fajfado Jiang An baldaŭ finis la riparadon.

Li piedpremis la akcelilon kaj veturis senhalte du horojn, sed subite la sperta Jiang An sentis teruron: li perdis la vojon.

Li rigardis ĉirkaŭen kaj vidis nur la senliman dezerton. Sur ĝi videblis nur la kamiono kaj la lante subiranta sangkolora suno. Jiang An ekridis senzorge.

La vidkampo de la homo estas limigita, kaj ĉe la rando de la vidkampo de Jiang An kreskis densa arbaro de poploj, en kiu loĝis grupo da lupoj.

Kaj en sia senzorga rideto Jiang An sentis teruron eligitan el la bela kvieta dezerto. Li konsciis sian eraron kaj rapide streĉis la pensojn por trovi solvon: ĉu veturi plu antaŭen laŭ la sperto aŭ veturi returne? Li hezitis. Sur la dezerto videblis nur la lante subiranta sangkolora suno, kaj Jiang An havis ŝviton sur la frunto pro timo. Sed li refoje ekridetis senzorge kaj elprenis moneron por fari aŭguron.

Apenaŭ Jiang An suriris la eraran vojon, la lupoj jam sciis tion.

Juna lupo Min fulmrapide heroldis la aferon en la arbaro.

La unua decido estis farita de Wang, la ĉefo de la lupoj. Maljuna lupo Wang aplombe diris nur unu frazon: Ne estas tempo ataki!

La vojperdo de Jiang An estus sendanĝera, se en la luparo ne estus la elstara lupo Xiong. Malfeliĉe estis, ke la luparo havis Xiong. Ĝi estis lupo en aĝo de ĉefo, sed ne havis ŝancon. Ĝi, ambicia, nepre agos kontraŭ la ĉefo. Tuj ĉe la finiĝo de la frazo de la ĉefo, Xiong laŭte demandis: "Kial ne ataki?"

La ĉefo havis neniun reagon, kaj lupo apud ĝi respondis: "Tio ne koncernas vin."

Xiong redemandis laŭte: "Pri kio ni rajtas deman-

di?"

Antaŭ ol ricevi respondon, ĝi diris kun ofendiĝo kaj ekscitiĝo: "Ni malsatis jam plurajn tagojn! Dum longa tempo ni ne manĝis homon! Ni bezonas nur vivi kaj ion manĝi!"

La ĉefo rikanis. La lupo apud ĝi diris: "Xiong, tute klare! Kion ni povus fari kontraŭ la bonkvalita usona kamiono kun cisterno da benzino? Ĉu vi kredas, ke la kamiono ne havos benzinon? Ĉu vi ne urĝas nin al morto?"

Konfuziĝis la lupoj. Ili rigardis jen al la ĉefo, jen al Xiong, ne sciante kion fari.

Xiong levis la kapon kun longa suspiro kaj fermis la okulojn.

Tio estis subtila momento, en kiu Jiang An estis konscionta la mispaŝon, la lupoj estis atakontaj aŭ male, silento regis sur la dezerto, la aero vibris kaj la suno en vento apatie rigardis ĉion antaŭ si.

Xiong subite malfermis la okulojn kaj diris kun bedaŭro: "Kia momento nun estas? Kial ni disputas senĉese, sed ne kaptas la bonŝancon ataki? Jes, tie estas granda kaj fortika kamiono kun benzino, sed ni bezonas homon, nur homon! Ni baldaŭ mortos de malsato!"

Aproba rumoro leviĝis en la luparo.

Post momenta silento la ĉefo diris: "Bone diris Xiong! Nun mi ordonas, ke Xiong gvidu 18 fortajn lupojn al atako!"

Huraado resonis en la arbaro.

Xiong ne povis ne senti admiron al la ĉefo pro ĝia decido. Ĝia ordono konkeris la koron de la regatoj kaj samtempe forsendis sian antagoniston al batalejo. Bone komprenante la ĉefon, Xiong decidis ne atendi plu kaj kapti la ŝancon renversi la ĉefon.

Xiong diris: "Dankon al via moŝto, sed mi havas malgrandan peton, nome sendi dek veteranojn helpi min." Xiong kaj ĝiaj subuloj genuiĝis antaŭ la ĉefo.

En la fanatika atmosfero agitita de Xiong, la ĉefo havis nenion alian krom elekti dek el siaj konfidatoj. La ĉefo aludis al ili per okuloj, ke ili gajnu la batalon kaj ankaŭ venku Xiong.

Xiong kaj 28 lupoj sage pafiĝis el la arbaro.

La monera aŭguro indikis al Jiang An, ke li veturu returne. Jiang An startigis sian aŭton, returnis ĝin, fininte hezitanon. Sed al li okazis akcidento neniom grava por ŝoforoj fakte: paneis la motoro pro elĉerpiĝo de benzino. Jiang An do levis sitelon por preni ĝin el la cisterno.

Ĝuste je la momento alvenis la lupoj.

Apenaŭ Jiang malfermis la pordon de la stirejo, Xiong la unua ĵetis sin al li. Jiang An tuj retiriĝis, sed la lupo jam deŝiris de li duonon de la pantalontubo. Lupoj! Jiang An falis sur la benkon kaj tuj komprenis: Lupoj ja estas la fonto de la teruro, danĝero, hezito kaj maltrankvilo! Sed Jiang An baldaŭ trankviliĝis:

Nur kelke da lupoj, dum mi havas bonkvalitan usonan kamionon, kaj en la stirejo estas fusilo, cent kugloj, kesto da manĝaĵoj kaj akvo por tri tagoj. Krom tio, kiel forta viro, Jang An havis ankaŭ tri kapablojn: fajfado, rakontado kaj pafado.

Komenciĝis la batalo inter la homo kaj lupoj. La suno jam subiris kaj la vesperruĝo ruĝigis pli ol duonon de la dezerto.

Tiam Xiong jam retiriĝis por manovrado. Kelkaj dikaj maljunaj lupoj, vidante, ke Xiong deŝiris duonon de la pantalontubo, fiksitis sian rigardon sur la pordo de la stirejo. Baldaŭ ĉesis la malordo. Jiang An firme tenis la fusilon kaj celis du plej dikajn lupojn. Li bone sciis, ke la unua pafo estas ege grava kiel averto al la lupoj.

Je du pafoj falis du maljunaj lupoj. Tuj diskuris la lupoj teruritaj. Xiong fluge kuregis en la profundon de la dezerto kaj hurlante alvokis siajn subulojn.

Jiang An gajnis la unuan lukton.

Post malapero de la lupoj Jiang An rimarkis, ke la luno estas leviganta. Jiang An ekridis. Tio estis fiera rido de la viro, kiu pafmortigis lupojn sola en la fama dezerto. Li ja havos ion por rakonti al aliaj. Kia plêzuro, ke unu kuglo kontraŭ unu lupo! Li bruligis cigaredon kaj profunde kaj malrapide fumis ĝin. Li estis ironia preni benzinon, sed li haltigis sin. Li jam postrestis de la karavano, kaj neniom gravis pli aŭ malpli longa prokrasto laŭ li. Li supozis, ke la lupoj revenos. Ja nur dudek-kelke da lupoj, dudek-kelke da kugloj jam sufiĉos. Li decidis ekstermi ĉiujn tiujn lupojn, por eviti timon ĉe la refoja disiĝo de la karavano. Jiang An ekscitiĝis kaj daŭrigis la fumadon, purigante la fusilon. Li planis preni benzinon post fumado, se ne revenos la lupoj. Sed kiam li forfumis duonon de la cigaredo, li rimarkis, ke revenis la lupoj. Pasis nur kvin minutoj depost ilia forkuro. Jiang An estis surprizita de la reveno de la lupoj.

Ĉi-foje Jiang An rekonis Xiong. Ĝi estis alta maldika lupo kaj arogante iris en la fronto de la lupoj. En homa pensmaniero Jiang An supozis, ke Xiong estas nur riskema, kaj la vera potenculo ja estas la dika lupo malantaŭ Xiong. Kiel proverbo diras, por ekstermi bandon necesas unue kapti ĝian ĉefon. Jiang An decidis preterlasi Xiong kaj unue mortigi la dikan lupon. Je la pafo ekhezitis la lupoj; je la dua pafo Xiong ekkriis kaj la lupoj ĉirkaŭis lin. La lupoj tute malatentis la mortigitan lupon kaj antaŭenpuŝigis sekvante Xiong. Jiang An komprenis: Xiong estas la komandanto!

Sed Jiang An malfruiĝis: li jam ne vidis Xiong.

Fakte Xiong estis tuj sub liaj okuloj. El la morto de la maljunaj lupoj ĝi trovis lokon neatingeblan de pafo de Jiang An, tial ĝi pafigis sub la ŝtupeton sub la stirejo. Tie ĝi komandis fojan kaj refojan atakon far la lupoj kontraŭ la du aŭtopordoj, sugestante al ili, ke la spacoj ĉe ambaŭ ekstremoj de la kamiono kaj sub la ĉasio estas la plej bonaj ŝirmejoj. La morto de la maljunaj lupoj gojigis Xiong, kvazaŭ ĝi jam rimar-

kus la senhelpecon kaj malfortecon de la ĉefo perdinta la subtenantojn.

Lupoj falis unu post alia, sed aliaj denove sturmis en grupoj. Xiong plurfoje sendis la lupon Min informi, ke baldaŭ pereos la homo ĉirkaŭita, ke tie estas multe da viando. La novvenintoj demandis tuj ĉe la alveno: "Kie la viando?" Xiong lasis ilin manĝi la mortigitajn lupojn. Vere bongustega estis la karno de la lupoj, kiuj mortis ne pro malsano nek pro senileco; kaj krome, por akiri la viandon ili ne bezonis batalon. Xiong estis sufiĉe sata kaj ne bezonis maltrankviliĝi pri provianto. Ĝi kuŝis sub la ŝtupeto kaj senhaste manovradis kontraŭ la homo.

En la sekvanta tago, kiam leviĝis la suno, Jiang An stuporiĝis: en la nokto li pafmortigis 50 lupojn. Jes, unu kuglo kontraŭ unu lupo. Sed restis nur ostoj de tiuj 50 lupoj, dum pli ol 100 vivaj lupoj estis atendantaj ĉirkaŭ la kamiono. Ili aspektis senhaste, pigre kaj ĝentile. Jiang An komprenis post longa tempo: "Ĉu la lupoj utiligas lin? Lupoj utiligas homon?"

Post la tutnokta batalo Jiang An demetis la fusilon.

La tago pasis en reciproka malcedo. Jiang An ne pafis, se ne estis kriza momento. Li pensis, ke la lupoj foriros, se li ĉesos pretigi al ili viandon. Jiang An opiniis ridinda tion, ke ili ambaŭ estis en amuzado. La lupoj venis kvazaŭ por admiri lian trafan pafadon kaj frandi freŝan lupajon. Sed poste li eklumiĝis el la iluzia amuzado kaj intencis preni benzinon. Sed apenaŭ li malfermis la pordon, kelke da lupoj fluge ĵetiĝis sur lin. Li tuj fermis la pordon, kaj lia mandorso jam estis vundita de lupaj ungoj. Ĉe la vespero Jiang An provis tion kelkfoje, sed la lupoj ĉu apudaj ĉu malproksimaj tuj rimarkis lian intencon. Ne! Plene komprenis Jiang An: "Tio ne estas ŝerco!"

Jiang An komencis skribi tagnotojn. Li dividis la manĝaĵojn en malgrandajn porciojn kaj manĝis dome. Li konservis sian urinion por eventuala bezono. Li faris ankaŭ serion da preparoj por longedaŭra batalo kaj ŝlisis la ridon sur la vizaĝo.

En la tria tago la luparo fariĝis pli granda.

En la kvara tago la luparo fariĝis des pli granda



Nekrologo



S-ro Tokuda Rokuro, fama aktivulo en Esperanto-movado kaj prezidanto de la Sizuoka Esperanto-Klubo de Japanio, forpasis la 10-an de januaro, 1995.

S-ro Tokuda Rokuro naskiĝis en 1904. Li laboris en la Internacia Unio, redakcio de Japana Informilo kaj japana radiostacio NHK. Li emeritiĝis en 1962 kaj de tiam li dediĉis sian energion al propagando kaj disvastigo de Esperanto.

En la pasintaj jardekoj s-ro Tokuda Rokuro faris grandan penadon por la amikeco inter la popoloj kaj esperantistaroj de Ĉinio kaj Japanio. En 1973, post kiam Ĉinio kaj Japanio restarigis diplomatajn rilatojn, dank' al lia klopodo realiĝis la vizito de ĉinaj esperantistoj al Japanio. Poste li 4-foje gvidis Esperantan delegacion en vizito al Ĉinio. Li estis multe interesata en la ĉina E-movado kaj tenis intimajn rilatojn kun ĉinaj esperantistoj de maljuna generacio. Li akcelis ĝemeliĝon de la Sizuoka Esperanto-Klubo de Japanio kaj la Zhejiang-a Esperanto-Asocio de Ĉinio kaj iliajn intervizitojn. En 1972 s-ro Tokuda Rokuro ekfunkciis kiel peranto de ĉinaj Esperantaj libroj kaj la revuo *El Popola Ĉinio*. Li faris tiun laboron ĝis 1991, kiam li 87-jariĝis.

**Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de "El Popola Ĉinio"**

kaj nombris 250.

Jiang An havis nur dek kuglojn. Li sentis dormemon, lacegon, malsategon kaj soifon. Lia haŭto krevis de sekeco kaj la okuloj enfalis.

Xiong eliris el la ŝirmejo, sidiĝis sur nemalproksima duno kaj rigardis al Jiang An. Ĝi estis bone nutrita, energioplena, trankvila kaj aspektis kiel ĝentlemano. Sed Xiong antaŭe estis humilaĉa, kaj tiu batalo banis ĝin. Ĝi tute ne atendis sian saĝon tiel impone disvolvita en la batalo inter ĝi, la ĉefo kaj la homo. Pere de la homo ĝi humiligis la ĉefon, pere de la lupoj ĝi najlis la homon, kaj pere de la homo ĝi mortigis lupojn. Mortigi lupojn pere de homo estis epokfara taktiko: Samtempe ĝi sukcesas malfortigi kaj la ĉefon kaj la homon, kaj ankaŭ forigi la senilajn, debilajn kaj malsanajn lupojn. Antaŭ ol finiĝis la batalo, Xiong jam akiris absolutan subtenon de la lupoj, preskaŭ ĉiuj lupoj subiĝis al ĝi, kaj la ĉefo fariĝis soleca en la arbaro. Kiel statis la homo? Li kolapsis tago post tago.

Xiong sidis sur la duno kaj fiksis la rigardon sur Jiang An. Ĝi ne hastis, sed li estis ĝia celo.

Jiang An refoje vidis Xiong kaj volis mortigi ĝin, sed li trovis, ke li ne povas sukcesi en tio, ĉar la kuglo apenaŭ povis atingi la lokon, kiun elektis Xiong. De tiu momento Jiang An penis nur por mortigi unue Xiong, ĉar li jam komprenis, ke ĉiuj aliaj lupoj estas sentaŭguloj, kaj nur Xiong estas forta. Estis Xiong, kiu insidis kontraŭ li. Li kredis, ke li estos mortigita de Xiong, se li devos morti. Jiang An decidis rezervi unu kuglon por Xiong! Sed lia plano ekzistis nur unu

horon. La furioza atako de lupoj kontraŭ la pordo konsumis la lastajn kuglojn de Jiang An. Ili iom rompis la pordon kaj la glacon.

En la naŭa aŭ la deka tago Jiang An levis la elektristan poŝtranĉilon. Jiang An estis en terura soifo kaj dormemo. Dum kvar tagoj kaj kvar noktoj li ne havis akvon por trinki. Sed malgraŭ tio li levis la elektristan poŝtranĉilon.

La tranĉilo de Jiang An rebrilis kiel gemo en la suno. Tion vidinte, Xiong skuis la hararon kaj senhaste proksimiĝis al Jiang An.

Jiang An ekridis. Li najlis sian rigardon sur Xiong firme, firme tenante la tranĉilon. Liaj lipoj, krevintaj pro sekeco, sangis. Li apogis sin sur la benko kaj preskaŭ perdis la konscion. Li estis malforta kiel bebo. La dezerto kaj la ĉielo, la luno kaj la suno, la tempo kaj la spaco, eĉ la vivo kaj la morto, ĉio malaperis. Tamen li ankoraŭ tenis la tranĉilon firme.

Estis vespero kun belega vesperruĝo. La ĥaosa batalejo subite fariĝis kvieta.

Subite Xiong kaj Jiang An sin ĵetis unu al la alia post longa interrigardado. Tuj poste, la rebrilanta elektrista poŝtranĉilo flugis el la stirejo kaj fulme faris strekon sur la ruĝa ĉielo super la dezerto. ■

(Esperantigita de **WANG SHIRONG**)

*La novelo temas pri malfeliĉo vere okazinta antaŭ 40 jaroj en la dezerto Taklimakan. La bonkvalita usona kamiono estis rimarkita de alia vojperdinta ŝoforo duonjaron post la akcidento. En la stirejo estis amaseto da homaj ostoj kaj taglibro, kiu priskribis la lupon Xiong.

POR VIA SANO


Masaĝo en la ĉiutaga vivo (V)

MASAĜO DE LA BRUSTO KAJ VENTRO

Masaĝoj de la brusto kaj ventro estas efikaj por reguligi la lienan kaj stomakan funkciojn kaj kuraci dispepsion, brustan depresion, ventran doloron kaj intestan perturbon.

Staru flanke de la masaĝato, kiu devas kuŝi surdorse.


1. Per via dika fingro premu laŭvice la akupunkturajn punktojn *ŝanĝong* kaj *juĝen* sur la brusto; *ŝang'uan*, *ĝong'uan*, *ŝjaŭan*, *tjanŝu*, *ĝihaj* kaj *ĝuanjŭan* sur la ventro (Bildo 3). Premu ĉiun punkton 3 fojojn po 10-20 sekundojn.



1. Juĝong 2. Ĝong'uan 3. Tjanŝu
4. Ĉjihaj 5. Ĝuanjŭan 6. Ŝenĉjŭe
7. Ŝjaŭan 8. Ŝang'uan 9. Juĝen
10. Ŝanĝong

2. Per viaj dikaj fingroj premu la bruston kaj per viaj aliaj fingroj, ĉefe la montraj kaj mezaj fingroj, premu la akselojn (Bildo 4). Kaptu la brustajn muskolojn. Tiru kaj malstreĉu ilin. Faru tion de interne eksteren, sume 3 fojojn.

3. Per viaj dikaj fingroj puŝu la bruston de la akupunktura punkto *ŝanĝong* ĝis la akupunkturaj punktoj *juĝong* ambaŭflanke de ĝi kaj puŝu ĝin eksteren laŭ la interspacoj de la ripoj ĝis la brusta ekstremo. Puŝu ĝin malsupren je unu interspaco de la ripoj. Poste puŝu la bruston, de la meza linio ambaŭflanken ĝis la brusta ekstremo. Per viaj manplatoj puŝu la supran parton de la ventro kaj iom post iom malsupren, de la meza linio de la ventro ambaŭflanken. Finu vian masaĝon, kiam viaj manplatoj atingos la akupunk-




turan punkton *ĝuanjŭan*. Faru tion sume 3 fojojn.

4. Frotu la ventron per la tuta manplato turnata (Bildo 5). Faru tion de la meza parto de la ventro. Dekstrume turnu la manplaton eksteren. Faru tion 30-50 fojojn. Faru la frotadon maldekstren, de ekstere internen, ankaŭ 30-50 fojojn.

5. Per viaj manoj kaptu la ventron de unu flanko al la alia. Faru tiamaniere: Malforte tiru per la manoj haŭton, endotelion kaj muskolon de la ventro por momento kaj delasu ilin. Movu la manojn antaŭen kaj tiru alian parton de la ventro. Delasu ĝin. Faru tion sume 3 fojojn.

6. Per viaj manplatoj puŝu la ventron, de la meza linio ambaŭflanken, de la supra parto malsupren. Faru tion sume 3 fojojn. ■



Nekrologo



Fama ĉina esperantisto s-ro Chen Shide (Zensto) forpasis en Pekino, la 2-an de marto, 1995.

S-ro Chen Shide naskiĝis en 1905 en la urbo Suzhou de Jiangsu-provinco. Li eklernis Esperanton en 1928. En 1931 li kaj s-ro Hujucz kaj aliaj fondis Ĉinan Proletan Esperantistan Union. Poste li pli aktive partoprenis en E-movado de diversaj lokoj. Li funkciigis E-kursojn, fondis E-asociojn kaj multe klopodis por disvastigi nian lingvon en Ĉinio.

De 1952 s-ro Chen Shide laboris en la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de *El Popola Ĉinio*. Li gvidis E-kursojn en superaj lernejoj kaj kulturis nombron da profesiaj esperantistoj por Ĉinio. Li estis prezidanto de la Suzhou-a E-asocio, prezidanto de la Jiangsu-a E-asocio, komitatano de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj poste ĝia honora komitatano. Krome li estis ankaŭ ĉefredaktoro de la *Nova Vortaro Esperanta-Ĉina*.

Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de "El Popola Ĉinio"

EN somera tago, promenante sur la strato, mi vidis, ke Pekino altiĝis kaj verdiĝis.

Nenio miriga estas mia diro, ke la urbo altiĝis. En la pasintaj dek jaroj, rapide progresis la urba konstruado. Escepte de iuj tradiciaj kortohavaj domoj, estas malkonstruitaj la malnovaj kabanoj kaj leviĝis oficejaj domturoj, magazenoj, hoteloj kaj multaj plansetlejoj. Ankaŭ multe pliboniĝis la trafikado. La ĉirkaŭurbaj ŝoseoj, la 79 trefkruciĝoj alte super la antaŭaj vojoj, akcentis la impreson, ke altiĝis Pekino.

Kaj la verdiĝon oni facile rimarkas. Antaŭe Pekino estis griza urbo vualita de polva aero. En la pasintaj jaroj oni plantis multajn arbojn en kaj ekster la urbo, oni laŭeble plantis florojn kaj herbojn, konstruis florbedojn, por iom post iom kovri ĉiun colon da tero per verdaĵoj. Eĉ la trefkruciĝoj estis verdigitaj per grimplantoj.

La altiĝo de Pekino montris prosperon de la moderna ĉefurbo, ĝia verdiĝo la median belecon. Mi vivas en ĉi tiu prospera kaj bela urbo, komforte kaj plezure.

La pekinanoj amas sian urbon kaj atente prizorgas sian medion

FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO

Pri la publika moralo en Ĉinio

de HOU JUELIANG

per volonta medioprotekta laboro. Printempe oficistoj, lernantoj, laboristoj kaj loĝantoj iras planti arbojn en la ĉirkaŭurbo. Instruistoj kaj lernantoj ofte purigas la balustradojn sur la stratoj. Aŭtune la loĝantoj balaas la falintajn foliojn. Vintre la urbanoj forŝovelas neĝon sur la trotuaroj kaj stratoj.

Sur la stratoj oni povas vidi, ke antaŭ pordo de multaj oficejaj domoj, lernejoj, fabrikoj, vendejoj kaj aliaj staras ligna tabulo kun skribo "Tri devoj antaŭ la pordo". Kion tio signifas? La verdiĝo, pureco kaj bona ordo. Tio estas postulo de la magistrato. Oni devas teni purecon kaj bonan ordon de la spaco antaŭ sia pordo kaj planti florojn, herbojn kaj arbojn ĉirkaŭ sia domo, kaj la vetur-

iloj antaŭ la pordo devas esti en bona ordo. Dank' al ĉies prizorgo la medio de la urbo pli kaj pli boniĝis.

Kiam mi iras labori, mi devas transpasi la ĉirkaŭfosaĵon 8 km longan sude de Pekino. Pro senzorgo dum multaj jaroj la ĉirkaŭfosaĵo ŝlimiĝis, disfluis la malpura akvo, kaj fiŝoj ne povis vivi en la akvo. La loĝantoj plendis al la registaro. Antaŭ du jaroj la registaro konsumis grandan sumon da mono por dragi la ĉirkaŭfosaĵon. Oni pavimis la fluejon per cementaj brikoj kaj starigis balustradojn ambaŭborde de la ĉirkaŭfosaĵo, kaj sur centoj da balustroj oni almetis ŝtonan leonon. Super la ĉirkaŭfosaĵo estas blankaj ŝtonaj ark-pontoj. En la antaŭurbo estas traktejo de malpura akvo, kaj malpura akvo ne plu fluis en la ĉirkaŭfosaĵon. Fiŝoj naĝas en la ĉirkaŭfosaĵo kaj plezurboatoj glitas sur la akvo. Ambaŭflanke de la ĉirkaŭfosaĵo sterniĝas zonoj de verdaĵoj. Mi loĝas proksime de la ĉirkaŭfosaĵo. En somera vespero mi ofte promenadas ĉe la ĉirkaŭfosaĵo. Fronte al la pejzaĝo, mi kore dankas la laboristojn, kiuj dragis la fosaĵon

Tamen al iuj homoj mankas publika moralo. Ili laŭvole iras sur la gazonoj kaj derompas florbrancetojn. Ili ĵetas en la akvon rubon aŭ terbulojn por sin distri. Iuj kolportistoj vendas fruktojn, melonsemojn kaj glaciaĵojn ĉe la pontoj, kaj la homoj senzorge ĵetas teren la ŝelojn de fruktoj kaj

Publikan moralon havas ankaŭ infano.



pakpapirojn de glaciaĵoj, kvankam proksime staras rubuoj. Tio ja estas bedaŭrinda.

En plibonigado de la medio, oni ja povas rimarki tiajn malagrablajn agadojn detruantajn la bonan etoson. En promenejoj estas multaj skulptaĵoj, sed iuj malpurigis aŭ eĉ detruis ilin. Ankaŭ ĵurnaloj de aliaj lokoj raportis pri tiaj fiagoj en siaj urboj. Ekzemple, iuj gravuris aŭ skribisian nomon sur arbotrunko kaj muro de konstruaĵoj en vidindejoj.

En la pasinta Nacia Festo, en la

Surakva Parko de Tianjin, la ĝardenistoj per 20 miloj da ruĝaj ombreloj ornamis la parkon por celebri la feston. Sed post kelke da tagoj multe da ombreloj perdiĝis. La Tianjin-anoj koleriĝis pro tio. Ĵurnaloj kritikis tiun eventon. Poste la ĝardenistoj refoje ornamis la parkon per ruĝaj kaj koloraj ombreloj. Feliĉe ĉi-foje nenio skandala okazis. Tiu ĉi okazaĵo atentigis la socion, ke necesas akcenti la socian konsciencon kaj publikan moralon.

Al la malmultaj homoj, kiuj intence detruis la socian objekton


aŭ ordon, oni devas fari punon laŭ leĝo. Ekz., ie telefonoj de telefonkioskoj estis intence difektitaj, elektraj kabloj estis fortranĉitaj, feraj ferplatoj kaj kradoj de kloako estis ŝtelitaj, arboj en pitoreskejo estis hakfaligitaj. Tiaj detruantoj devas esti kondamnitaj de la publiko kaj punitaj de leĝo.

Ĉinio estas civilizita lando kun longa historio kaj morala tradicio. Mi pensas, ke la nunaj ĉinoj, sin dediĉantaj al la konstruado de la moderna materia civilizacio, scipovas heredi kaj daŭrigi la bonan moralon de la prauloj kaj krei modernan civilizitan socion. ■

Nova libro eldonita de Ĉina Esperanto-Eldonejo

Mirrakontoj de Liaozhai

La Esperanta versio "Mirrakontoj de Liaozhai" kun 86 pecoj elektitaj el la fama klasika verko "Mirrakontoj de Babilo-ĉambro" de Pu Songling (1640-1715). Prenante popolarakonton kiel materialon de sia verko kaj aplikante romantikismon kaj realismon en kombino kaj lingvon vivecan, li kreis interesajn intrigojn kaj personigis vulpojn kaj fantomojn por esprimi sian indignon kontraŭ la malluma feŭda socio. Li akre kritikis la putran ŝtatan ekzamenan sistemon por elekto de oficistoj kaj malkaŝis la krimojn de la avidaj koruptitaj oficistoj. Li kreis en sia novelaro multajn gustoplenajn rakontojn pri sincera amo de junuloj, kiuj kuraĝe rompis la katenojn de la feŭdisma etiko. La novelaron elĉinigis s-ro Laŭlum.



Formato: 14.5 x 21 cm. (bind.), 624 pĝ.
kun 35 nigrablankaj ilustraĵoj en antikva stilo

prezo: 18.00 USD

Mendu ĉe Distribua Fako de EPĈ, Libro-servo de UEA aŭ nia peranto en via lando.

KURANTAJ AFEROJ

KULTURO

- “Enciklopedio de Konfucea Kulturo” eldoniĝis lastatempe en Pekino. Konfuceo (551-479 a. K.) estis fama pensulo, edukisto kaj fondinto de konfuceanismo. La enciklopedio konsistas el volumoj pri liaj kariero, ideologio, doktrino, genealogio kaj hejmloko. La enciklopedio el 2.8 milionoj da ideogramoj konigas la konfucean kulturon kaj ĝian evoluon. La enciklopedio entenas ankaŭ apendicojn de kroniko de Konfuceo, indekso de ĉefaj verkoj pri Konfuceo faritaj de post 1912 kaj la katalogo de ĉefaj verkoj de novaj eruditoj pri konfuceanismo.

- Mapo de naŭ neĝaj montpintoj pli ol 8 000 metrojn super la marnivelo estis eldonita lastatempe en Xi'an, Shaanxi-provinco.

En la mondo estas 14 neĝaj montpintoj tiom alte super la marnivelo, kaj 9 el ili troviĝas en Ĉinio, kiel Qomolangma (8 848 m), Qogir (8 611 m) kaj Xixabangma (8 012 m).

- La plej granda ĉina papilia muzeo estis konstruita lastatempe en Kunming, ĉefurbo de Yunnan-provinco, en sudokcidenta Ĉinio. Tie eksponiĝas la plej belaj papilioj el diversaj landoj de la mondo kaj ankaŭ la plej fama speco de Ĉinio. La vizitantoj povas mikroskope rigardi papiliojn kaj koni ilian kreskadon.



La papilia muzeo en Kunming

- La Fremdlingva Eldonejo de Ĉinio eldonis antaŭ nelonge la klasikan romanon “Tri Regno” en la angla lingvo. Antaŭ tio la eldonejo jam eldonis la aliajn tri el la kvar plej famaj ĉinaj klasikaj romanoj “Ruĝdoma Songo”, “Makisanoj en Akvejo” kaj “Pilgrimado al la Okcidento”. En la pasintaj jaroj la eldonejo angligis multajn ĉinajn klasikajn romanojn, ekzemple “La Kleruloj”, “Mirrakontoj en Liaozhai”, “Li Sao” (lamento) kaj

“La Palaco de Eterna Juneco”.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

- La monda problemo de meĥanika glitado de aŭto, kiu dumlonge implikis la aŭtofabrikan kampon, estis solvita en Ĉinio.

Oni konstatis, ke la aŭta glitilo estas avangarda kaj la unua en la mondo. Kun ĝi aŭto glitas pli longe, brulaĵo ŝpariĝas kaj ellasita gaso malmultiĝas. Ĝia ĝeneraligo alportos grandan profiton kaj socian influon.

La glitilo estas fiksita inter la duon-akso kaj radmezo de aŭto. Oni ne bezonas ŝanĝi projekton de aŭto kaj veturo estas sekura. La iniciatinto de la glitilo estas veterana laboristo Shi Qiwen de Henan-provinco.

- Per nova datmezura tekniko de elektronika rotacia resonanco, profesoro Huang Peihua kaj liaj kamaradoj de la fakultato de geo- kaj spaco-scienco de la Ĉina Scienc-teknika Universitato precize datis la ekzistadon de pekinaj simi-homoj, nome antaŭ 600-250 mil jaroj, kaj la simi-homoj de Hexian de Anhui-provinco ekzistis antaŭ 300 mil jaroj.

- Post 12-jara penado teknikistoj de Sichuan-provinco sukcesis elkulturi 13 specojn da kunikloj kun haroj oranĝaj, brune ruĝaj, purpuraj, ore flavaj kaj malhele verdaj. La naskopovo, vivipovo kaj adaptiĝemo de la kunikloj estas pli superaj ol tiuj de usonaj koloraj kunikloj.

- Zoologoj kaj botanikistoj de Ĉinio trovis en la pitoreskejo Wanshengshan de Sichuan-provinco 7 nigrajn presbitojn, same valorajn kiel pando. La fakuloj raportis, ke la grandaj el la presbitoj pezas 20-30 kg. kaj longas 60 cm., kaj la malgrandaj pezas 15 kg. kaj longas 40 cm.

- En 1994 Ĉinio kreis rekordon en reproduktado de pandoj, ke postvivis 7 el la 9 novnaskitaj pandidoj. En la 25 jaroj de 1963 ĝis 1988 ĉinoj reproduktis 93 pandidojn, sed postvivis nur 28 el ili. De post 1989 ĉinoj faris pli da penado en reproduktado kaj akiris 47 pandidojn, el kiuj 33 postvivis.

- Krizantemo estas unu el la plej frue kulturataj vegetaloj en Ĉinio kaj ankaŭ kulturata vegetalo kun plej multe da variantoj. Sed en la pasintaj 2 000 jaroj de kulturado de krizantemo oni ankoraŭ ne konis la originon de krizantemo nek la formiĝon de ĝiaj variantoj.

Por-doktoriĝa esploranto-studentino Dai Silan prezentis tezon post 6-jara esplorado, ke krizantemo originis de sovaĝaj dendrantemoj (*Dendranthema vestitum* kaj *Dendranthema indicum*). Ŝi opiniis, ke ĝi originis ĉefe de speciala varianto formita post homa

selektado de naturaj specioj kaj hibrida specio. Samtempe ŝi esploris ankaŭ la parencecon kaj la tendencon de la evoluo de la specioj de krizantemo.

MEDICINO

● Esploristoj Guan Chongfen, Wu Xiaoxian kaj Lu Yaozeng de la Ĉina Akademio de Tradicia Ĉina Medicino kaj la Ĉina Medicina Akademio penis du jarojn kaj elfaris medikamenton Zhongyan n-ro 1 efikan por kuraci aideson. Ĉinaj medicinistoj provis ĝin sur 52 aidesuloj en Tanzanio kaj ĝi efikis sur duono el ili.

SPORTO

● S-ino Lang Ping estis unu el la plej bonaj flugpilkistinoj en la mondo. Antaŭ nelonge ŝi revenis de Usono al Ĉinio por labori kiel ĉeftrejnistino de la ĉina virina flugpilka teamo. En 1987 ŝi iris al Usono kaj jam finis la lecionojn de la angla lingvo kaj sportologio en universitato kaj finis en majo ĉi-jare la studon por magistriĝo. En Usono ŝi ludis flugpilkon kaj faris trejnadon. Kiam ŝi informiĝis pri la deziro de la ĉina virina flugpilka teamo, ke ŝi estu ĝia trejnistino, ŝi senhezite konsentis. Ŝi kredas kun memfido, ke la ĉina virina flugpilka teamo elturniĝos el la malbona situacio.



S-ino Lang Ping intervjuata

ARKEOLOGIO

● Oni malkovris en Aomen ruinon de metiejo de jadaĵoj de neolitiko antaŭ 4 000 jaroj. Tie oni trovis potojn kaj vazojn por kuirado kaj ŝtonajn martelon, hakilon, frotilon kaj truilon por farado de jadaĵ ornamaĵoj.

S-ro Deng Cong, direktoro de la Ĉina Arkeologia Centro de la Ĉinlingva Instituto de Hongkong, diris, ke la nove trovitaj antikvaĵoj estas tre similaj al

tiuj trovitaj en la Delto de Perlo-rivero, Hongkong, Taiwan kaj Vjetnamio. Tio montras, ke antaŭ 3-4 miloj da jaroj jam estis kulturaj interrilatoj de la homoj de Taiwan-markolo ĝis la suda marbordo de Hindoĉinio. Li akcentis, ke la trovo en Aomen estas tre grava por koni la marajn kulturajn interŝanĝojn de la sudorienta marbordo.

EKONOMIO

● Konstruado de la ĉina unua ekspresa fervojo, la Pekin-Ŝanhaja Fervojo, estis enlistigita en la Naŭan Kvinjaran Planon (1996-2000). La fervojo estos konstruata laŭ la normo de 300 km en horo. En rapideco de 250 km/h veturado inter Pekino kaj Ŝanhajo bezonos malpli ol 6 horojn por la tuta distanco de 1 400 km.

● La urbo Danjiangkou en la nordokcidenta parto de Hubei-provinco estas la plej granda ĉina bazo de reta-kesta bredado de fiŝoj. Danjiangkou havas akvejojn kun totala areo de 50 mil hektaroj, inkluzive de Danjiangkou-akvokonservejo kaj 44 hektaroj da akvejoj, kiuj estas utiligataj por reta-kesta bredado de fiŝoj. En 1994 Danjiangkou liveris 6 milionojn da kg. da fiŝoj, kiuj konsistigis 80% de la vendokvanto de la loka merkato. Krome la fiŝoj estis liverataj ankaŭ al Zhengzhou, Xi'an kaj Pekino.



Reta-kesta bredado de fiŝoj en Danjiangkou-akvokonservejo

● Enketo raportis, ke 70% de la 2 milionoj da kamparanoj en la antaŭurbo de Ŝanhajo ĉesis kulturati la teron, ĉar ili estis allogitaj al la industriaj entreprenoj en la kamparo. Krome tieaj kamparanoj sin turnis al transportado, bien-negoco kaj terciaraj industrioj. En 1991 la kamparanoj enspezis meznombro 1 800 juanojn kaj en 1994 jam 3 400 juanojn. Malgraŭ tio la kampoj restas prosperaj pro tio, ke ilin bone prizorgas la enmigrintaj alprovincaj kamparanoj.

JIAXING estas urbeto en la nordorienta parto de Zhejiang-provinco. En tiu tempo tie pluvetis. La riveroj, la lagoj, la malproksimaj bambuaroj kaj la loĝdomoj estis vualitaj de pluveroj. Plensarĝitaj ŝipoj malrapide veturis unu post alia sur kanalo; iu boato kviete ankriĝis ĉe kajo. La pejzaĝo por mi, nordanino, estis eksterordinare freŝa.

Sur urbeta strato viciĝis standoj de akvoproduktaĵoj. Frumane oni venis tien de kamparo. En tiuj tagoj mi ofte promenadis sur la strato malantaŭ mia hotelo. La fiŝoj estis vivaj, grasaj kaj multspecaj, kaj iliajn nomojn plejparte mi ne scias. “Kiom kostas 500 gramoj da salikokoj?” iu ne serioze demandis. La demandita vendisto, kiu estis okupiĝanta pri maŝarĝado, nevole donis respondon. Eble tiaj homoj estas tro riĉaj, vivante en tiu loko abunda je fiŝoj kaj rizo, do por ili ne gravas unu aŭ du klientoj. Plie, la komercado estas tiel prospera, ke ili ne bezonas ĉagreniĝi pri la vendo. En la fiŝstandoj multas manĝeblaj testudoj. Ili pezas ĝenerale po ĉ. unu kg. En la pasintaj jaroj, opiniante ke testudo estas utila por longviveco, oni emis ĝin manĝi. Tiel ĝi fariĝis multekosta. Laŭdire, unu testudido peza je 50 gramoj kostas 35 juanojn. Post unu-jara bredado ĝi pezos 500 gramojn kaj kostos 80 juanojn. Nemalmultaj sin ekokupis pri bredado de testudoj por sin riĉigi. Por unu familio ne estas malfacile bredi 1 000 testudojn en unu jaro. Tamen por mi la plej interesaj estis la malhelbrunaj kraboj, grasaj, ŝaŭmantaj en plasta kuvo. La Jiaxing-anoj bone scias, kiel frandi krabojn, precipe la loĝantoj de Qinzhu-vilaĝo. Ili scipovas

PANG NAIYING:

Impreso pri Jiaxing

fari frandaĵon el malgrandaj kraboj kun makulhava ŝelo. La vilaĝanoj metis zantoksilon (*Zanthoxylum bungeanum*) en krabojn kaj konservas ilin en vino kun sukero. Unu monaton poste, la frandaĵo estas preta.

Estas plezuro en pluva tago viziti Nanhu-lagon, kiu situas sude de Jiaxing. Laŭdire, tie pluvas 200 tagojn en jaro, kaj la lago famas pro sia nebula beleco. Antaŭ mil jaroj antikvuloj starigis la Nebulpluvan Pavilonon sur la insulo. Kiam mi veturis per motorboato al la pavilono, ĉi tiu jen aperis jen malaperis en pluvo. Sur la lago estis densa nebulo kaj el la fiŝboatoj aŭdiĝis frapado. Mia kunvojaĝanto Jiaxing-ano diris, ke la fiŝistoj estas frapantaj feran objekton por venigi fiŝojn — tio estas malnova fiŝkapta metodo.

Ĉe la bordo de la lago iu maljunulo estis vendanta trapojn. La

ĵus kuiritaj trapoĵoj en nilona retsako ankoraŭ vaporis. Trapoĵoj kun karno blanka kaj delikata, aroma kaj dolĉa kreskas en akvolando kaj efikas por sensoifigo. Oni plantas trapoĵojn en la lasta tagdeko de aprilo, transplantas ilin en la dua tagdeko de majo kaj rikoltas ilin en aŭgusto. Tiam la kamparaj knabinoj remas per granda ligna kuvo sur la lago, kantante rikoltas trapoĵojn kaj poste veturas per boato al la urbo por vendi ilin.

Mi imagis, ke la krioj de la knabinoj dum vendado estas belsonaj, bedaŭrinde mi ne havis ŝancon por aŭdi. Ŝajne por kompensi tion, iu lokano donacis al mi du sakoĵojn da trapoĵoj de Nanhu. Mi rimarkis, ke la trapoĵoj estas senkornaj.

“Tio estas produktaĵoj de Nanhu.” La lokano rakontis al mi jenan historieton: 200 jarojn antaŭe,

Nanhu-lago





Vendistino de viandaj *zongzi*-oj

en sezono de rikolto de trapoj imperiestro Qianlong inspektis la lokon. Li gustumis trapojn kaj ebriiĝis de la kantoj kaj la pejzaĝo de fiŝistaj vilaĝoj. Neatendite, korno de trapo pikis lian buŝon. La imperiestro veis: "Kiel bone, se la trapo estus senkorna!" Interese, Nanhu-trapoj fariĝis poste senkornaj. Laŭ ilia formo oni nomis ilin "Oraj Ingotoj" aŭ "Senkornuloj". Poste iu transplantis tiajn trapojn en loko 50 km fore. Tamen la tie kreskintaj trapoj portas kornojn. La kialo nun ankoraŭ estas enigma.

Fragmitoj kaj kelkaj baŝooj fulme malantaŭeniĝis ekster la aŭtofenestro. La pejzaĝo vekis ĉe mi grandan intereson. Mi vidis amasojn da nekonataj arboj kun malalta trunko kaj densaj branĉoj en kamparo. Pri ili mi demandis Jiaxing-anon s-ro Xiao Huang. Li diris, ke tiuj estas morusarboj. Mi dubis, ĉar ankaŭ en norda Ĉinio troviĝas morusarboj altaj, malsamaj kiel la sudaj kun alteco de nur unu metro kaj kun granda tubero en la supro de la trunko. "Por multigi morusfoliojn, ĉiujare la kamparanoj fortondas malnovajn branĉojn ĉe la sama punkto por kreskigi novajn branĉojn, tial inter la trunko kaj la branĉoj aperas tia pugnoforma tubero, nomata 'morusarba pugno'..." Xiao Huang rakontis interese kaj mi aŭskultis scivoleme.

Jiaxing estas lando de silkraŭpoj. Oni diris, ke tie ne estas familio sen silkraŭpoj, ne estas terpeco sen morusarboj. En

Majiabin-vilaĝo estas ruino de neolitika kulturo 7 000 jarojn antaŭe. Tie malkovriĝis ne nur fajencaĵoj kaj rizo, sed ankaŭ pecoj de silkaĵo. Tio montras, ke en tiu tempo la Jiaxing-anoj jam scipovis planti morusarbojn, bredi silkraŭpojn kaj teksu silkon.

Por maljunaj Jiaxing-anoj, neniuj kamplaboro estas pli mistera kaj serioza ol bredado de silkraŭpoj. Ili rigardas silkraŭpon kiel fean raŭpon, kiun ili kultas. Aprile, kiam komenciĝas bredado de silkraŭpoj, la virinoj faras banon kaj ŝanĝas la veston, zorgeme envolvas ovojn de silkraŭpoj en puran mantukon kaj metas ĝin en sian sinon por varmigi la ovojn kaj helpi la elkoviĝon. Kiam silkraŭpoj eloviĝas, la virinoj surmetas paperajn florojn en la hararon por preĝi por sukceso de la bredado. Oni notis en loka kroniko: Kiam venas la monato por bredi silkraŭpojn, ĉiuj familioj fermas la pordon kaj ĉiuj homoj restas hejme; oni ĉirkaŭas sian domon per fragmita kurteno por la bredado; la registaro ĉesas kolekti impostojn; la vilaĝaj lernejoj paŭzas; ne okazas geedziĝa kaj funebra ceremonioj; eĉ amikaj kamparanoj ne vizitas sin reciproke; kaj ĉiuj homoj devas mallaŭte paroli. Ili opinias, ke se la dio de silkraŭpo estus ofendita, la bredado estus malfacila.

Fama ĉina verkisto Mao Dun priskribis en sia novelo "Prin-tempaj Silkraŭpoj" la vivon de Jiaxing-anoj en la 30-aj jaroj, kiuj bredis silkraŭpojn. La ĉefrolo de

la novelo maljuna Tongbao penege bredis silkraŭpojn en la tuta sezono kaj rikoltis abundon da kokonoj. Tamen li ne povis elvendi la kokonojn pro bankroto de la kokon-elbobenejo.

S-ro Mao Dun estis Jiaxing-ano. Lia iama loĝejo situas en profunda strateto de Wuzhen-urbeto. Ambaŭflanke de la strateto viciĝas multaj kokon-aĉetejoj. Nun la "posteuloj" de maljuna Tongbao ne plu ĉagreniĝas pri vendo de kokonoj.

Estas sennombraj silkaj teksejoj en Jiaxing. La Jiaxing-anoj faris silkan negocon jam kun alilandanoj. S-ro Jiang Yongzhang, ĝenerala direktoro de la Jiaxing-a Silka Korporacio, diris al mi, ke inter la 14 ĉefaj kokonproduktejoj de Ĉinio Jiaxing okupas la unuan lokon. Antaŭe Jiaxing liveris krudmaterialojn ĉefe al silkaj urboj, kiaj Hangzhou, Suzhou kaj Huzhou. Post la ekpraktikado de la politiko de reformado kaj pordomalfermo la Jiaxing-anoj ne nur teksis silkon el siaj propraj krudmaterialoj, sed ankaŭ la unuaj produktis novan silkan trikoton kaj faris el ĝi altklasajn modajn silkajn vestojn por eksporto. Ili donis al sia produktaĵo fabrikan markon Jie Sang kun desegno de silkraŭpo kuŝanta sur morusfolio, super kiu estas tufo da silkaj fadenoj...

Mi veturis al la stacidomo per triciklo. Denove pluvis. La triciklisto lerte veturigis min inter fluoj de homoj kaj veturiloj. Ĉie ĉe la stacidomo aŭdiĝis vendista krio "Jiaxing-a vianda *zongzi*-o* ". 10 *zongzi*-oj estis metitaj inter du ovalaj bambuaj plektaĵoj kun ruĝa papero en loka gusto. Ne nur la viandaj *zongzi*-oj estis apetitivekaj, sed ankaŭ la delikataj bambuaj korboj estis altiraj, ke mi volis aĉeti unu por kunporti ĝin al la hejmo en la nordo. ■

*Piramid-forma manĝaĵo farita el glueca rizo kaj ĉirkaŭvolvita per bambuaj aŭ fragmitaj folioj.

XIAO NAN:

Ĉina tenisisto Xia Jiaping



Xia Jiaping en konkurso

SOMERE de 1992 Xia Jiaping gajnis la ĉampionecon de tenisa solludo en la Monda Sportkunveno de Studentoj. Kiam li staris sur la premi-podio, oni vidis, ke li estas je kapo malpli alta ol la itala tenisisto 1.90 m alta, kiu gajnis la subĉampionecon.

Staturu ĝenerale ne malhelpas la karieron de ordinara homo, sed por tenisisto, kies staturu estas malpli ol 1.75 m, tio estas problema por lia sukceso. Kaj Xia Jiaping, kun staturu de 1.68 m, multe suferis sur la vojo de sia kariero.

Li naskiĝis en 1969. La patro estis trejnisto de piedpilkado, la patrino — instruistino de sporta lernejo kaj la avo — fama ĉina tenisisto en la 50-aj jaroj. Influate de la sportista familio, li ŝatas sporton de la infanaĝo.

En 1983 14-jara Xia Jiaping unuafoje partoprenis en la Tutlanda Geknaba Tenisa Konkurso de Ĉinio kaj gajnis la subĉampionecon. Ĝuste tiam koncerna departemento elektis junajn sportistojn por trejni ilin eksterlande. Bedaŭrinde, li ne estis elektita pro sia malalta staturu.

Iuj samaĝuloj, kiuj ludis tenison malpli bone ol Xia Jiaping, estis elektitaj, kio multe dolorigis lian koron. La gepatroj deadmonis lin de tenisado, dezirante, ke li bone lernu por fariĝi studento. Sed Xia Jiaping ne konsentis kun ili. Li ŝatas tenison, kiu montras forton, saĝon, lertecon kaj volon. El tiu amo li ignoris doloradon en la manoj kun veziketoj kaŭzita en ludado. Li sin ekzercis en la lernejo kaj en la hejmo. Li portis grandan esperon por la estonteco.

Tamen la realaĵo ne estis tia, kian imagis Xia Jiaping. En la jaroj 1984-1987 li ekzercis sin multe pli pene ol aliaj, multfoje venkis sportistojn, kiuj ekokupiĝis pri tenisado pli frue ol li, kaj enviciĝis inter la sportistoj, kiuj gajnis la unuajn 6 lokojn en la tutlan-

da konkurso A, tamen li estis neglektata kaj ne havis sian lokon en la ĉina teamo. La kaŭzo estis lia malalta staturu.

Post kiam li unuafoje malsukcesis kandidatiĝi por esti trejnata eksterlande, li ĉiutage sopiris kreskigis sian staturon. La trejnistoj, kiuj ŝatis lian spritecon en ludo, ankaŭ tion esperis. Fervoruloj rekomendis al li artikolojn pri staturu-kresko en ĵurnaloj, por ke li tion provu. Sed vane. Kiam li estis 18-jara, li altis nur 1.68 m.

Kion fari por sin altigi? Li neniam forlasis sian celon. Li diris: “Mi ŝatas ludi tenison kaj estas lerta en la ludo. Se nur mi povos partopreni konkurson, por mi tute egale, ĉu membriĝi al la ĉina teamo aŭ ne. Staturu ne estas decida faktoro por mia estonteco. Mi volas per mia penado pruvi tion.”

Por li ne estis facile realigi sian promeson. Li ne estis pli forta ol la altastaturaj sportistoj ĉu en alto, forto kaj rapido de serviro, ĉu en reto-blokado, precipe en moviĝo la longkruraj sportistoj havas sian superecon.

Kontraŭ tiuj malavantaĝoj Xia Jiaping alprenis la rimedon “la mallerta birdo ekflugu pli frue”. Kiam aliaj sin ekzercis dek horojn, li do — 15 horojn; kiam aliaj sin distris, li do legis libron kaj studis pri tekniko en la ĉambro.

Dank’ al penema trejniĝo kaj studado, Xia Jiaping ekkomprenis: “Konante sian mankon, oni povas fari progreson. Sub tiu premiso, bone konante sian superecon, oni povas elekti por si ĝustan metodon sin ekzerci, por ke la manko estu forigita paŝon post paŝo.” Ekz., li ekzercis sin per varianta serviro por reagi kontraŭ aliaj, kiuj serviris pli forte ol li; por forigi sian mankon en reto-blokado, li turnis sian atenton al ekzercado de reakcia kaj antaŭvida povo por fari kiel eble plej precizan juĝon kaj antaŭtempan ekagon. En

EN iu bela somera mateno antaŭ sunleviĝo la ĉielruĝo trapenetris malpezan nebulon kaj kisis la surfacon de Yangzi-rivero. En la haveno de la monturbo Chongqing ankriĝis la blanka plezurŝipo Princino Xianni, kiu veturigos nin al la Tri Gorgoj de Yangzi-rivero. Pasaĝeroj estis enŝipiĝantaj. Je la momento ekestis sceno sur la flosponto interliganta la kajon kaj la ŝipon: Ŝipaninoj en vicoj blovis per latunaj instrumentoj por bonvenigi la pasaĝerojn. La gaja muziko akompanis ilin enties enŝipiĝo. Momenton poste, sonis sirenado kaj la ŝipo startis laŭ la fluo.

Jen svarmis sur la ferdekoj ĉ. 200 pasaĝeroj el Singapuro, Koreio, Japanio, Francio, Usono, Hongkongo kaj Taiwan. Ili ĝoje parolis malsamajn lingvojn, kvazaŭ infanoj ĝuus la belan pejzaĝon.

Ankaŭ mi tre ĝojis pro la baldaŭa ĝuado de la belaj pejzaĝoj de la Tri Gorgoj kaj veturado per luksa plezurŝipo. Antaŭ longe mi ja aspiris al la belaj Tri Gorgoj kun torenta akvo kaj

CHUAN BIAO:

Vojaĝo al la Tri Gorgoj de Yangzi-rivero

min ĉiam interesis la ŝipoj veturantaj al la Tri Gorgoj.

Mirindis, ke ni estis permesitaj rigardi diversajn instalaĵojn de la ŝipo. Nia akompanantino s-ino Wang, direktorino de la restoracio en la ŝipo, konigis al ni, ke la plezurŝipo Princino Xianni estas unu el la tri mondnivelaj plezurŝipoj aĉetitaj de la Ĉina Kompanio de Reĝaj Luksaj Plezurŝipoj en 1993. Ĝi, kvinetaĝa, longas 129.15 m kaj havas 258 litojn. En ĝi estas luksaj ĉambroj, unu- kaj dulitaj kajutoj, telefonoj, faksiloj, restoracioj de ĉinaj kaj okcidentaj manĝaĵoj, amuzejo, bufedejo, sunumejo, kosmetikejo kaj gimnastejo. La plezurŝipo, kiel plej bone instalita plezurŝipo sur

Yangzi-rivero, povas rivali per siaj instalaĵoj kun kvarstela hotelo internacia.

En la stirejo ni renkontiĝis kun ŝipestro Du Chongxin kaj liaj kamaradoj. En la Tri Gorgoj la akvo estas torenta, navigvojo zigzaga, kaj malprofundaĵoj multaj. Por sekurigi la veturadon oni provizis la ŝipon per tri sistemoj de aŭtomata manipulado kaj du plurfunkciaj radaroj, tiel ke neblas al ĝi perdi la kapblon sin regi, eĉ se okazos eventuale io neatendita. La kompanio invite laborigis nombron da spertaj stiristoj. En infanaĝo s-ro Du Chongxin lernis stiradon sur Yangzi-rivero. Li bone konas la riveron kaj tre lertas en stirado. La plezurŝipo estas provizita per

ludado li laŭeble disvolvis sian lertecon en moviĝo.

Dank' al la ĝusta konado pri si mem kaj diligenta trejniĝo, Xia Jiaping rikoltis sukceson foje refoje. En 1988, gajninte la kvaran lokon de solludo kaj la kvinan lokon de parludo en la tutlanda tenisa konkurso A, Xia Jiaping estis elektita kiel membro de la ĉina teamo B.

En la sesa monato post kiam Xia Jiaping estis akceptita de la ĉina teamo, okazis internacia konkurso, aprobita de la Internacia Tenisa Federacio. Ĝin partoprenis multaj profesiaj tenisistoj. Laŭ la plano Xia Jiaping povis senpere partopreni la oficialan konkurson, ĉar li sukcesis en la teama konkurso. Sed fakte, li partoprenis la kvalifikan konkurson. Samtempe la ĉina tenisa teamo decidis revenigi kelkajn sportistojn, kiuj sin ekzercis unu jaron eksterlande, al la oficiala konkurso.

En la kvalifika konkurso Xia Jiaping gajnis 2 sinsekvajn matĉojn kaj eniris en la oficialan konkurson, en kiu li venkis fortan sportiston.

En 1989 Xia Jiaping, kiel membro de la ĉina

teamo, kiu gajnis la teaman ĉampionecon de la tutlanda konkurso A, fariĝis la ĉampiono de solludo de la konkurso. En la 11-a Azia Sportkunveno, kiu okazis en Pekino en 1990, la Ĉina Vira Tenisa Teamo unuafoje gajnis la ĉampionecon de azia sportkunveno, kaj por tio li faris sian kontribuon. En 1993 li estis la ĉampiono de la Azia Tenisa Ĉampionea Konkurso. En 1994 li gajnis la ĉampionecon de vira solludo kaj tiun de vira parludo en la ĝenerala finalo de la tutlanda tenisa turniro de Ĉinio. Li diris al mi: "Mi devas dediĉi mian energion por intensigi mian korpan trejniĝon. Mi celas kiel eble plej frue antaŭigi mian lokon en la monda tenisistaro."

Lastjare li partoprenis en ĉ. dek konkursoj por profesiaj sportistoj kaj bone konis sian mankon en ludo. Li decidis ŝanĝi sian ludarton, opiniante, ke se nur li bone posedos ofensivan ludarton, li povos rapide progresi.

El la progreso de Xia Jiaping videblas, ke por tiu, kiu neniam submetiĝos al sia malsukceso en la batalo por la vivo, malfavora cirkonstancaro kaj portempa maljusteco povas turniĝi en movforton por superi la rivalon. ■



Alilandaj turistoj sur la plezurŝipo
Princino Xianni

fajra alarmilo, brulimunaj tapiŝoj kaj fenestro-kurtenoj kaj boatoj, kiuj povas unufoje forporti ĉiujn pasaĝerojn. Kaj krome, la administracio de la ŝipo ankaŭ asekuras la vivon de la pasaĝeroj kontraŭ akcidento.

Estas kvar itineroj por ĝui la pejzaĝojn de Yangzi-rivero, t.e. de Chongqing al Wuhan ĉe la mezo de Yangzi-rivero, kaj de Ŝanhajo al Chongqing kaj returne.

Ĉi-foje ni prenis la duan itineron. La plezurŝipo ekveturis de Chongqing. Ĝi veturis malrapide sur la rivero, por ke la pasaĝeroj multe ĝuu la pejzaĝojn. Posttagmeze ni enveturis la Tri Gorgojn (Qutang, Wuxia kaj Xiling), kiuj komenciĝas de Baidicheng de Sichuan-provinco okcidente kaj finiĝas ĉe Nanjinpasejo de Hubei-provinco oriente, kun totala longo de 192 km.

La plej malgranda Qutang-gorgo longas ok km kaj majestas per mallarĝa surfaco kaj krutaĵoj ambaŭborde. En iu loko la larĝeco estas nur iom pli ol 100 m. Al la rokmuroj alkroĉiĝas antikvaj kornicaj vojoj, eskaloj kaj aliaj vidindaĵoj, kiaj Rinocero kaj la Luno. Je la momento multaj kaptis la scenon per fotilo kaj videoregistrato.

Matene de la sekvanta tago nia ŝipo trairis Qutang-gorgon kaj ankriĝis ĉe malgranda kajo kaj la pasaĝeroj ekveturis boate al la Malgrandaj Tri Gorgoj, rivereto enfluanta la okcidentan parton de Wuxia-gorgo. Nia boato malfacile veturis kontraŭ la

fluo, iafoje helpate de remiloj. Tie la rivero torentas kaj ĉe borde staras ĉielskrapantaj rokmuroj, ie pendas antikvaj ĉerkoj. La Malgrandaj Tri Gorgoj abundas je vidindaĵoj. Se oni veturas per kanuo, oni sentas tie neespri-meblan agrablecon. Sed bedaŭrinde, tempo ne permesis kaj ni devis veturi returne.

Kiam nia plezurŝipo eniris la belan Wuxia-gorgon, ni sentis nin kvazaŭ en tute alia medio. La tieaj pejzaĝoj estas tre ĉarmaj. Ambaŭborde de la gorgo staras la 12 pintoj de Wushan-monto, el kiuj la plej impona estas Diino-pinto, fama en Ĉinio.

Xiling-gorgo estas la plej granda el la tri gorgoj. Ĝi longas 66 km. Tie la torenta rivero havas multe da malprofundaĵoj. Antaŭe, kiam oni ŝipe atingis la lokon, oni sentis grandan teruron, ĉar tie ajna malatento kaŭzis akcidenton. Tamen nia plezurŝipo veturis en ĝi stabile. La pasaĝeroj ĝoje babilis sen timo.

Dum la vojaĝo la pasaĝeroj povas viziti ankaŭ historiajn vidindaĵojn ambaŭborde. Kuraĝaj junuloj povas boate veturi sur torenta rivereto kaj en tio speras agrablecon en luktado kun la naturo. Kiam ili revenas, servistoj donas al ili lavtukon por forviŝi la ŝviton. Se iu ne sentas sin bone dum la vojaĝo, kuracisto senprokraste kuracas lin; se iu pasigas sian naskiĝtagon, li povas ricevi freŝajn florojn kaj donacon. La pasaĝeroj povas gustumi en la ŝipo lokajn pladojn kaj etmanĝaĵojn kaj spekti tradiciajn ĉinajn *usu*-ojn, akrobataĵojn kaj kaligrafaĵojn.

Nia plezurŝipo atingis la finan stacion Wuhan vespere de la kvara tago post sia ekveturo. La ŝipaninoj ludis la muzikon "Eterna Amikeco". En la muziko kaj plaŭdo de la akvo la pasaĝeroj forlasis la plezurŝipon kaj kun ĝojo finis sian vojaĝon.

GALERIO

"Montoj kaj Rivero en Mil Li-oj"

Teksto de RUAN HAIYING

La pentraĵo "Montoj kaj Rivero en Mil Li-oj*" estis reprezentanta verko de pentristo Wang Ximeng de Song-dinastio (960-1279). Kiam li faris tiun pentraĵon, li estis nur 18-jara. La pentraĵo sur silko longas 12 metrojn kaj altas 0.51 metron.

Per delikataj linioj, drastaj koloroj, vasta horizontaleco kaj riĉa enhavo, la pentristo priskribis la grandiozecon de la naturo kaj prezentis belajn bildojn de la kamparo: vilaĝo, foiro, fiŝboato, pramo, ponto, norio, turisto k.a. La pentraĵo enkorpiĝis la amon de la aŭtoro al la naturo, la vivo kaj la patrolando.

La pentraĵo prenas la bluan kaj verdan koloron kiel la ĉefajn. La peza kaj malpeza farbado markis la distancojn de la objektoj. Drastaj lumoj evidencigis la briletadon de la akvo, agrablan sunlumon kaj viglan nebulon. La pentraĵo farita de la aŭtoro en duonjaro impresas per imponeco kaj poezieco. Ĝi estas rigardata kiel senmorta majstraĵo en la ĉina piktura historio.

Ĉi tie estas montrataj partoj de la verko.

* Unu li-o egalas al duonkilometro.





Bambuo

Bambuo en Ĉinio havas 300 speciojn, kiuj konsistigas trionon de la totala nombro de la bambu-specioj de la mondo. Bambuo kreskas en la subtropika kaj mezvarma zonoj sude de la Flava Rivero. Bambuo estas uzata en konstruado, paperfarado, meblofarado, farado de metiartaĵoj, fiŝhokstangoj, manĝaĵoj k.a. Ĉinoj ekutiligis bambuon antaŭ 5 000 jaroj. Multaj literaturistoj kaj pentristoj ŝatas priskribi bambuon kaj komparas ĝin kun noblaj homoj.

La poŝtmarko-serio pri bambuo kun kvar pecoj estis emisiita en 1993 kune kun miniatura bloko.



ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九五年第六期
(本刊代号:二—九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2